



esperanto

SEPTEMBRO 1990 • 83-A JARO • N-RO 1017 (9)

ISSN 0014-0635



Novaj vizaĝoj en Havano

Enhavo

- 157 75-a Universala Kongreso de Esperanto, Havano, 14-21 julio 1990:
En Kubo ni estis ĉeftemo
- 158 Solena Inaŭguro: Ŝtatestro sur nia podio
- 159 Akcepto ĉe Fidel Castro: "Mi konsideras min soldato de Esperanto."
- 160 Kongresa temo: Ĉu evoluo ĉiam subpremos diversecon?;
Kongresa Rezolucio
- 161 Internacia Kongresa Universitato: Pri Karibio kaj aliaj temoj
- 162 Tago de la Libro: Aranĝo kun estonteco
Esperantologia Konferenco: Traduki kaj konservi
- 163 Tago de la Paco: Pozitivaj agoj por pluvivado
Belartaj Konkursoj: Ses laŭroj por Georgo Kamaĉo; Belartaj
Konkursoj de UEA 1990
- 164 Premio Deguĉi: Vera kolego de Zamenhof
- 165 Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj: Unuafoje ekster Eŭropo
- 166 Arta programo: Aŭskulti maratonon; Spektaklo sen subtekstoj;
Recenzo ĉe bushaltejo
- 168 Koncize pri . . . (mallongaj kongresaj raportetoj)
- 170 Insulo de la Junularo: Por fosi trezoron
- 171 Komitato kaj Estraro: Ŝanĝoj sen skuoj
- 172 Kongresaj stilekzercoj
- 174 46-a Internacia Junulara Kongreso: Taŭga festo por 50 000 krokodiloj
(Mark Fettes)
Kvinpinta Semajno: Kaj plu simile (F. J. Moleón)
- 176 Kongreseroj (gajaj kaj similaj piednotoj)

Vi trovos,

pli ol kutime anoniman numeron, ĉar preskaŭ ĉiujn tekstojn finverkis la redaktoro! Ne kredu, tamen, ke vi legas la impresojn nur de hazarde taskita oficisto. La havana kongresejo estis perfekta loko por fiŝkapti plej diversajn opiniojn de plej diversaj kongresanoj, kaj bunta mozaiko apenaŭ kaŝiĝas sub la maldika tavolo de ĵurnalista lako. Pri unu afero tamen ĉiuj konsentis: indis kongresi en Kubo. Ĉar profitis ne nur la kubanoj. Meksikianoj eble eĉ pli gajnis per siaj tre sukcesaj antaŭ- kaj post-kongresoj. Pluvojaĝantoj ankoraŭ nun vigligas la movadojn en apudaj landoj. Kaj por la pli multaj kongresanoj estis salutinde, denove renkonti la evolu-landan realon, en kiu loĝas ĉiam pli signifa parto de la Esperanto-movado. Se kongresoj kiel la havana plivastigas la kontaktojn kaj kunlaboron inter niaj diversaj mondoj, tio jam estas kerna atingo.

La kovrilo: Estis amaso da nekonatoj en la unua kongresa sabato, kiuj fariĝis konatoj kaj amikoj antaŭ la dua . . . kaj gajnis nian admiron per siaj penoj giĉetaj, prelegaj kaj organizaj. Elkoran dankon al tiuj novuloj, kiuj espereble ankaŭ malnoviĝos en niaj vicoj.

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 48,75; US\$ 23; GM 43; enoj 3600; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn. Anonctarifo (gld.): 1 p. 1540, 1/2 p. 850, 1/4 p. 470, 1/8 p. 260, 1/16 p. 150. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefakso: +3110 436 17 51.

Telekso: 23721 uea.nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: vakas.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigado, planado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. (081) 542 0302; telefakso (071) 383 4108.

Vicprezidanto (regiona agado, turismo, Fondumo Zamenhof): s-ro Roman Dobrzyński, u. Majdańska 13 m 91, PL-04-088 Warszawa, Pollando; tel. (22) 10 35 05.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj, esperantologio): d-ro Ulrich Lins, Gemar-kenstr. 150, D-5000 Köln 80, FR Germanio; tel. (0221) 680 32 50.

Ĝenerala Sekretario: s-ro Osmo Buller, Suksitie 4 B 15, SF-93400 Taivalkoski, Finnlando; tel. (988) 51 003; telefakso (988) 51 681.

Estrarano (informado): s-ro Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, B-2520 Edegem, Belgio; tel. (03) 440 30 92.

Estrarano (financo, junularo): s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano (landaj kaj fakaj asocioj): s-ro Oszkár Princz, Sallai u. 4. II.3, H-1136 Budapest, Hungario; tel. (HEA) (1) 15 60 244.

Estrarano (azia agado, aplikado en scienco): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 11, Seoul - 158-600, Korea Respubliko; tel. kaj telefakso (02) 646 5413.

Estrarano (kulturo): s-ino Spomenka Stimec, Nova Ves 87, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio; tel. (041) 42 92 51; telefakso (041) 42 12 94.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendahl, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47; telefakso (1) 43 66 09 92.



“Fidel ĉeestis la inaŭguron”: la novaĵo kuris ĝis la plej foraj anguloj de la lando.

75-a Universala Kongreso de Esperanto, Havano, 14-21 julio 1990:

En Kubo ni estis ĉeftemo

Se ni organizas niajn kongresojn en difinita lando unuavice por sproni la lokan Esperanto-movadon, tiam la 75-a UK en Havano estis maksimuma trafo kaj unu el la plej grandaj sukcesoj en nia longa kongresa historio. La fakto, ke al la Solena Inaŭguro venis la kuba prezidento Fidel Castro donis al tiu solenaĵo apartan signifon kaj turnis al la Kongreso la kompletan atenton de ĉiuj amaskomunikiloj de la lando. Ankaŭ la parolado, kiun en la Inaŭguro faris d-ro Carlos Rafael Rodríguez, vicprezidento de la lando kaj Alta Protektanto de la Kongreso, estis multilate unika kaj kontribuis al la atento, kiun ni ricevis en la gazetaro, radio kaj televido. Malofte okazas, ke ni estas la ĉeftemo de la kongresa lando, kaj en Kubo precize tion ni spertis. Tio estas sukceso, eĉ iom granda kaj unika.

La 75-a (jubilea numero!), 85 jarojn post Bulonjo, sukcesis arigi 1617 gekongresanojn el 54 landoj. Estas vero, ke proksimume 300 aliĝintoj ne venis al Havano, sed vero estas ankaŭ, ke pluraj dekoj se ne tuta centoj da aliaj esperantistoj estis tiusemajne en Havano kaj “kongresis” en sia senaliĝa maniero, ekster la hermetike fermita

kongresejo. Eble tiu fermiteco de la kongresejo, ĝia nealireblo por kubanoj kiuj ne portis la kongresan insignon, estas la ĉefa manko de la Kongreso. Ni ne bezonis tian sekurecon, des pli ke unu el la ĉefaj impresoj, kiujn ni reportis el Kubo, estas la korvarmo, helpemo kaj amikemo de la kuba popolo.

Ni kongresis en Havano en iom komplika tempo. Kiam ni antaŭ kelkaj jaroj decidis iri tien, la mondo havis tute alian politikan mapon. Ni siatempe imagis, ke al Havano venos tuta milo da bulgaroj, ĉeĥoj, ĉinoj, hungaroj, orient-germanoj, poloj, slovakoj kaj sovetianoj. Sed ĝuste ili estis la grandaj forestantoj en Havano, kvankam kelkdeko da bulgaroj kaj sovetianoj troviĝis tie. Antaŭ duona jaro ni serioze konsideris alternativan landon por la 75-a UK. Feliĉe, ke tiu solvo ne necesis, ĉar ĝi malebligis kongresi al kelkaj centoj da kubanoj kaj al pluraj dekoj da latin-amerikanoj, kiuj sukcesis veni al Kubo. La 75-a estas sukceso ankaŭ pro la fakto, ke ĝin konsistigis centoj kaj centoj da unuafojaj kongresanoj.

Perfekta kongresejo, malmultekosta loĝado, abundo da ekskursoj, bonaj

transport-aranĝoj, altnivelaj artaj aranĝoj, prelegoj de Internacia Kongresa Universitato ankaŭ en la Universitato de Havano, specialaj poŝtmarko kaj monero, bela (iom malplena) dokumentujo, impona libroservo, bonaj klerigaj programeroj, akurata kuriero, harmoniaj komitat-kunsidoj, funda trakto de la kongresa temo – ĉio ĉi estas aldonaj plusoj de la 75-a. Sed minusoj ankaŭ ne mankis: kaosa flughaveno, simila giĉeta servo en la kongresejo, afablo sed ankaŭ malkompetento de la turismaj instancoj, ĉiupaŝa avido je usonaj dolaroj, troa burokrateco eĉ ĉe aĉeto de alumetoj...

Sed, kial Fidel venis al la Kongreso? Tiu lasta romantikulo de la monda revolucio ĉiam havis kuraĝon. Ankaŭ nun li havas ĝin, ne nur por foje spiti al la monda evoluo sed ankaŭ por kuraĝe avangardi inter la mondaj politikistoj en sia subteno al Esperanto. Eĉ se pravas tiuj, kiuj asertas, ke Fidel malatentas iujn homajn rajtojn en sia lando, li kompetente kaj kuraĝe atentis aliajn, inter kiuj estas la rajto je komunikado kaj la neŭtrala internacia lingvo Esperanto. Ni devas saluti tian sintenon kaj tiun kuraĝon.

Solena Inaŭguro:

Ŝtatestro sur nia podio

Unu kongresa inaŭguro tre similas al aliaj, sed tiu en Kubo estis nekutima laŭ almenaŭ du kriterioj. Pasis 13 jaroj, de kiam ŝtatestro laste honoris la kongreson per sia persona ĉeesto; kaj preskaŭ same malofte okazas, ke la Alta Protektanto mem “festparolas” antaŭ la kongresanoj. Nu, Kubo ja estas nekutima lando.

Ĝuste la ĉeesto de Fidel Castro plej ekscitis la kongresanojn. Post ol konsterni la Estraron per sia senaverta lastminuta apero inter la diplomataj gastoj, li venis sur la scenejon kaj eĉ senparole turnis ĉiujn kapojn al si. Kvankam li tiam strikte silentis, li donis malavaran kompenson al ducento da kongresanoj ĉe akcepto kelkajn tagojn poste (vd. apartan artikolon).

Kubo d-ro Carlos Rafael Rodríguez, ne sukcesis tute eviti la kutiman pekon de kongresaj gastoj: instrui al la esperantistoj kion ili mem jam scias. Sed lia elokventa priskribo de la rolo de la homa lingvo en la evoluo de la socio falis sur akceptemajn orelojn, kaj lia varma apogo de Esperanto (“neniu heroaĵo estas pli granda ol tiu, kiun Zamenhof metis antaŭ si”) kompreneble entuziasmigis la aŭskultantojn. En siaj lastaj frazoj li aludis la signifon de la kongreso por Kubo mem, kaj la senton de izoliĝo kaj minaco, devenan el la lastatempaj ŝanĝoj en Eŭropo, kiun la esperantistoj povus helpi dispeli. La samtempa interpretado de Orlando Raola montriĝis adekvata, kvankam la hispana kaj Esperanto foje konkurencis

R. Juárez Sedeño kaj P. Lamas Díaz. Biografioj de ili, same kiel tiuj de finno O. Lehtivaara, japano Itô Kanzi (Ludovikito) kaj ĉino Wong Kenn, aperos en la oktobra numero.

La ĝenerala direktoro de UEA, Simo Milojević, prezentis la ĉeestantajn diplomatojn, ne tre multajn sed kun kelkaj surprizoj inter si. Plej miriga estis la partopreno de la ambasadoro de Albanio, verŝajne unuafoje en la historio de la Universalaj Kongresoj – paŝo promesplena por la estonteco de la movado en tiu malfermiĝanta lando. Pola ambasadano salutis la kongreson en bona Esperanto, nome de Pollando kaj ankaŭ de la ceteraj landoj reprezentataj: Aŭstrio, Bulgario, Ĉinio, Francio, Italio kaj Kanado. El Bjalistoko venis skriba saluto de la urbestro, kaj pluraj eminentaj aŭ ordinaj esperantistoj simile esprimis siajn bondezirojn al la 75-a.

La kuba organizo malhavigis al la inaŭguro ĝian menditan pianiston (kiel

*Milo da kongresanoj
fotas Fidel Castron
samtempe.*



UEA-prezidanto John Wells malfermis la kongreson per dankaj vortoj ne nur al la eminenta gasto, sed ankaŭ al la kuba movado ĝenerale: “verŝajne la sola en Karibio, pri kies forteco ni povas fieri”. En Kubo la kongresanoj trovos “novan pejzaĝon, novan kulturon, novajn manierojn aranĝi la socion” kaj siavice alportos la konon de sia propra kulturo. Ankaŭ la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, Jesús Castillo, emfazis la reciprokan ekkonon, kaj ke “ĉiu reportos al sia lando pecon de nia koro, pecon de nia lando.”

La Alta Protektanto, vicprezidanto de la Ŝtata kaj Ministra Konsilio de

inter si por la disponebla aŭdopovo.

Sekvis vico de enkondukoj. Menciindas, ke forestis de la podio (kaj de la kongreso) nur unu estrarano de UEA (G. Maertens, pro malsano), dum ĉeestis ankaŭ IKU-rektoro prof. Helmar Frank, TEJO-prezidanto Jan Koszmaluk, kaj unu el la plej valoraj kunlaborantoj de la kongreso, Lucía Sardiñas, vicedro de la kultura fako de la Centra Komitato de la Kuba Komunista Partio, kiu multfoje intervenis por tranĉi administrajn kaj organizajn nodojn. Wells krome anoncis la nomojn de kvin novaj Honoraj Membroj de UEA, inkluzive de du kubanoj, ludintaj ŝlosilan rolon en la starigo de la kuba movado:

okazis ankaŭ semajnon poste ĉe la Fermo!). Mendo tamen ne necesis por la tradicia salutado de la landaj asocioj, plenumita de kvardeko da homoj kun inventemo kaj entuziasmo. Inter pluraj aludoj al la monda politiko kaj lingvoproblemoj, eblis ekscii pri diversaj planoj por la Universalaj Kongresoj, atingoj pri informado, instruado kaj membronombro, kaj ekvidi kelkajn landojn, maloftajn en la UK-oj: i.a. Ĉilion, Haition, Meksikion, Portugalion, Zimbabvon. Post anonco, ke aliĝis pli ol 1600 kongresanoj el pli ol 50 landoj, kaj rapida ekprezento de la kadra temo fare de Wells, bulgara ĥoro kantis finon al la kongresa komenco.



*Almenaŭ unu estrarano venkis la lingvan barilon:
Roman Dobrzyński konversacias kun Fidel kaj la Alta
Protektanto de la Kongreso, Carlos Rafael Rodríguez (dekstre).*

Akcepto ĉe Fidel Castro:

“Mi konsideras min soldato de Esperanto.”

Iam en Pekino oni devis elfosi ducenton da kongresanoj por oficiala akcepto ene de unu tago. Tio ŝajnis jam la limo de la ebla. Sed jaŭdon posttagmeze en Havano aperis aro da kartoj kun la orlitera sciigo: “Fidel Castro Ruz, Unua Sekretario de la C.K. de la K.K.P., Prezidanto de la Ŝtata Konsilio kaj de la Registaro de la Kuba Respubliko, invitas vin al akcepto, aranĝota honore al la partoprenantoj en la 75-a Universala Kongreso de Esperanto, jaŭdon la 19-an de julio 1990 je 21h00.” Mirinde, en tiuj kelkaj horoj oni sukcesis kontakti preskaŭ ĉiujn komitatanojn, estraranojn de landaj asocioj, reprezentantojn de kvindek da landoj, certigi bonan ag-kaj seks-dividon kaj aranĝi taŭgan vestiĝon.

Kio surprizis, tio estis la entuziasmo de Fidel, kiu ne nur pacience manpremis kun ĉiuj (kaj babilis kun la plej belaj), sed poste spontane kaj verve parolis kun la ĉeestantoj dum preskaŭ unu horo. “Liestas brila oratoro,” konkludis multaj, certe trafe. Tamen, malantaŭ la profesiaj bonhumoro kaj elokvento, oni

emis diveni profundan impresiĝon pro la unika medio, kiun li unuafoje renkontis. Efektive Castro mem metis tion en belajn vortojn. Turnante sin antaŭ la publiko al 18-jara Keiko Snarberg, li deklaris: “Kiam vi eniris, mi vidis tiun knabineton kaj mi demandis al ŝi ‘Ĉu vi estas vjetnamino?’ –kvankam mi neniam vidis vjetnaminon kun bluaj okuloj. ‘Ne,’ ŝi respondis, ‘mi estas filino de japanino kaj svedo.’ Jen la vera signifo de Esperanto: japanino kun bluaj okuloj . . . ĉar malantaŭ Esperanto estas la amo.” Niaj legantoj povas imagi, kiel perfekte li trafis la korojn de siaj aŭskultantoj.

UEA-prezidanto John Wells bone ludis sian subite akiritan rolon de internacia diplomato. En sia saluto al la kuba ŝtatestro, li substrekis la rolon de Esperanto en la solvo de mondaj problemoj kaj la forigo de reciproka miskompreno kaj malfido. Kiel memoraĵojn li prezentis al Castro ses librojn – *Esperanta antologio* kaj *Jubileo*, la imponan *Dia komedio*, kaj tri pli personajn elektojn: *Doña Barbara*, verko

de iama prezidento de Venezuelo, Rómulo Gallegos; *Sanga nupto* de García Lorca; kaj la propran “verketon”, *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. Fakte nur lastmomente la ĝenerala direktoro sukcesis trapremi tiujn donacojn tra la maksimuma sekureckontrolo de la Palaco de la Revolucio.

La parolojn sekvis luksa bufeda manĝo, fakte tro luksa laŭ juĝo de pluraj partoprenantoj, kiuj ne povis eviti komparojn kun la malplenaj vendejoj ekstere. Sed pli alloga por multaj estis la konversacianta ŝtatestro, kiu ĝentile disdonadis aŭtografojn, interŝanĝis spritaĵojn kun ĉiu, kiu volis, kaj dise navigadis tra la grandega ĝardeneska marmora akceptejo meze de homa svarmo. Fidel Castro gajnis multajn amikojn tiun vesperon. Kaj Esperanto, laŭ ĉiuj indikoj, gajnis unu. Survoje al la elirejo, Castro ekvidis Wells kaj haltis por adiaŭa manpremo. “Mi konsideras min soldato de Esperanto,” li konfidis, antaŭ ol malaperi en la internan sanktejon de la Palaco.

Kongresa temo:

Ĉu evoluo ĉiam subpremos diversecon?

Malmultaj kongresoj el la lastaj jaroj donis tiel centran atenton al la kadra temo, kiel okazis en Havano. Realigis do almenaŭ unu aspiro de la kongresa sekretario! (Vidu la septembran numeron de antaŭ unu jaro.) Se ne konkludojn, oni tamen atingis pli grandan konscion ĉe multaj kongresanoj pri la komplikeco de la monda situacio.


“Kiam ni entuziasme turismadas tra la mondo, ni tamen devas memori la ĉiutagajn problemojn de tiuj kiuj parolas la ‘malgrandajn lingvojn’. Inter niaj idealoj de toleremo kaj interkompreniĝo

landoj kaj la ligoj inter kulturo kaj evoluo. Ĉiuj kvar estas bonaj komunikantoj, kaj la rezulto estis interesa por ĉiuj, kvankam necese nekompleta kiel bildo de la tuta problemaro. Bedaŭrinde ne troviĝis tempo – aŭ taŭgaj kaj tempohavaj fakuloj – por poste reveni al Azio kaj Afriko, la “kernaj” evolukontinentoj. Ni esperu, ke tio fariĝos pli kutima dum la naŭdekaj jaroj.

Tre konkretan kaj faktoplenan rigardon al la situacio en Latinameriko donis la sekvaj kunsidoj. Riĉenhava “simpozio” de neesperantistaj fakuloj, kun samtempa tradukado en Espe-

Usono, kies ekonomia forto kaj dinamisma kulturindustrio ĵetas longan ombbron suden. Entute tre bone funkciis la interŝanĝado de opinioj, kvankam pli kompleta reprezento de Latinameriko estus tre dezirinda.

Laŭ la tradicio, la temon fermis la Dua Ĝenerala Kunsido de UEA, kun liberaj intervenoj de la ĉeestantoj. Kiel ofte okazas en Esperanto-medioj, la diskuto rapide fokusiĝis al la problemoj de minoritatoj, precipe en la industriaj landoj. Oni aŭdis pri la situacio en Italio, Francio, Britio, Norvegio, Israelo, Luksemburgio kaj Kanado. Evidentiĝis



La salono Lapenna, bela kaj moderna, havis nur unu malavantaĝon: esti frostotreme malvarma . . .

devas elstari la kompreno de la vivrajto de la lingvoj kaj kulturoj de la evoluantaj landoj, fronte al la ekonomia forto de la superpotencoj.” Tiel resumis la bazan ideon de la temo ĝia reĝisoro Jane Edwards, enkonduke al la Dua Bulteno de la kongreso. Montriĝis, ke multaj kongresanoj pretas aktive partopreni en la diskutoj: en kvar diversaj kunsidoj, ĉeestis kutime centoj da homoj, do pli ol en iu alia kleriga programero. Kaj se la diskutoj emis koncentriĝi al lingvoproblemoj pli ol al evoludemandoj, nu, tio ja estas nia fako . . .

En la unua kunsido, kvar spertuloj – So Gilsu (Koreio), Ulrich Lins kaj Uwe Joachim Moritz (FRG), kaj Humphrey Tonkin (Usono) – prezentis bazajn faktojn kaj principojn pri la evoluantaj

ranton, malfeliĉe iom fiaskis: unue, ĉar oni misinformis la prelegantojn (profesoroj Alfredo Fernández kaj Jorge Nuñez) pri la disponebla tempo, kaj due, ĉar unusola kompatinda interpretisto provis elturniĝi sentekste dum la tuta tempo. Ankaŭ la uzo de kap-aŭskultiloj videble ĝenis la kongresanojn.

Pli sukcesa estis la tria sesio, kun vigla neformala diskuto surbaze de esperantistaj prelegetoj pri Brazilo (Evaldo Pauli), Ĉilio (José Vergara) kaj Meksikio (Juan Jacob Smitter). Komunaj al la tuta regiono ŝajnis esti la problemoj de indiĝeno-rajtoj – kiel protekti kaj rekompenci kontraŭ la atencoj de industrio kaj la “civilizo”? – kaj la eksterproportia potenco de

ofta distingo inter “novaj” kaj “malnovaj” minoritatoj, grupoj kun parte malsamaj celoj kaj problemoj. Entute reliefiĝis la timiga komplikeco de la monda situacio kaj la maleblo de unuecaj, simplaj solvoj.

Demandite, ĉu ŝi kontentas pri la rezultoj de la semajno, reĝisoro Edwards jesis: “Se oni ne atingis konkludojn, tamen oni ne rajtis atendi tion. Ĝenerale, kun la IKU-prelegoj kiuj rilatas al la temo kaj la kvar kunsidoj, oni multe pli detale traktis la temon ol ofte okazas. Mi kredas ke tio estas la ĝusta vojo, ĉar la kongresanoj sentas la gravecon pli bone, kaj estas ĝenerale kleriga sperto por ni ĉiuj.”

Kaj iom da konkludoj, tamen, troviĝas en la apuda rezolucio.

KONGRESA REZOLUCIO

La 75-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Havano (Kubo) de la 14-a ĝis la 21-a de julio 1990 kun 1 617 partoprenantoj el 54 landoj, kaj traktinte la temon "Esperanto, evoluo, kultura diverseco",

konstatas,

ke la kultura diverseco estas grava parto de la homa heredaĵo kaj ke la morto de lingvoj kaj kulturoj estas signifa perdo por la homaro;

ke, same kiel pri la kvalito de la biosfero, ni respondecas pri la heredigo de tiu kultura diverseco al postaj generacioj;

ke la lingvoj kaj kulturoj konstante evoluas: minoritatoj aperas kaj malaperas dum la monda socia kaj ekonomia situacio ŝanĝiĝas;

ke, aliflanke, simpla ignoro de la rajtoj de minoritatoj kaj koncentriĝo je plibonigo de materiaj vivkondiĉoj

endanĝerigas la liberecon de unuopaj popoloj evolui laŭ propra maniero;

ke sekve necesas krei strukturojn por efike administri diversecon en mondo kie la moderna vivo emas kondiĉi al ĉiam pli da unueco;

bonvenigas la iniciaton de Unesko lanĉi la jardekon de Kultura Evoluigo, kaj

notas, ke la kongresa temo estas rekte ligita al tiu jardeko;

atentigas pri la valoro de Esperanto kiel ponto inter la lingvoj kaj kulturoj kaj rimedo por interŝanĝoj;

alvokas Uneskon, ke ĝi pli aktive utiligu Esperanton kiel rimedon de kultura interŝanĝo; kaj

rekomendas al la diversaj Esperanto-organizaĵoj, ke ili partoprenu en la Jardeko kaj konsekvence atentu en la agado la ligojn inter la internacia lingvo kaj kultura diverseco.

Internacia Kongresa Universitato:

Pri Karibio kaj aliaj temoj

Du ekonomiaj, du literaturaj, tri medicinaj kaj kvar prilingvaj prelegoj konsistigis la 43-an sesion de IKU, kiu denove montriĝis altnivela kaj populara ero de la kongreso. Meze ĉ. 50 homoj ĉeestis la prelegojn, kvankam la prezidanto de UEA, per plia ero en sia longdaŭra serio "Lingve tra la mondo", allogis ĉirkaŭ la duoblon.

Rektoro Helmar Frank, kiu senmanke akompanis ĉiujn prelegantojn, mem kontribuis per historia skizo de la rilatoj inter la scienco kaj Esperanto. Nian lingvon same tuŝis Otto Prytz, kadre de la demando, kiel malsamaj kulturaj fonoj malhelpas la "problemsolvadon" kernan al la lingva komunikado, kaj Ilona Koutny, kiu prezentis la principojn malantaŭ sia doktoriĝa esplorado de voĉa komunikado kun komputilo. Werner Bormann proksime tuŝis la kongresan temon en siaj konsideroj pri la rilato inter ekonomia forteco kaj kultura forteco: ĉu Esperanto ebligas "malkupli" lingvan komunikadon disde kultura superregado?

La prelego de John Wells pri lingvoj de la kariba regiono estis nur unu el tiuj, kiuj profitis de la loko de la kongreso

por trakti temon geografie rilatan. James F. Cool, unu el la manpleno de usonaj partoprenantoj, prezentis la fascinan verkaron de la grava kariba verkisto Alejo Carpentier, kaj Jane Edwards (ankaŭ el Usono) traktis "Viro, virino kaj magio en la latinamerika romano" per tiom riĉa materialo, ke nur la plej spertaj povis daŭre sekvi ĝis la fino. Tria usonano (naskita peruano), Franklin Montenegro, donis bildon de kostkontrolo en la usona medicina sistemo. Por la lokaj homoj tio sendube prezentis interesan kontraston al la ŝtataj kubaj sanservoj.


"Veneno" estis la temo de svisa kemiisto Rudi Hauger, kiu enplektis filozofiajn konsiderojn en sian skizon de tiu ĝenerala esplorkampo, dum la eminenta biokemiisto Sini'tirô Kawamura (Japanio) turnis sin al la malvenena vitamino C kaj ĝiaj unikaj ecoj.

Eble plej aktuala estis la prelego de koreo So Gilsu, pri la faktoroj de ekonomia progreso en Suda Koreio. Kiam li prezentis ĝin pere de interpretisto al grupo de kubaj fakuloj, la demandoj kaj diskutoj daŭris pli ol tri horojn... Ĉi-jare ĉiuj IKU-prelegantoj



IKU: Cool pri Carpentier.

havis okazon alparoli siajn kubajn samfakanojn per la helpo de interpretisto, ĉu en la Scienca Akademio, ĉu en la Universitato. UEA krome eldonis du-lingvan libreton kun informoj pri la prelegoj kaj prelegantoj.



Bruĉjo Kasini, estro de Edistudio, trovis tempon por lasi sian redaktadon de gazetaraj komunikoj kaj kongresaj kurieroj kaj veni al la Tago de la Libro.

Tago de la Libro:

Aranĝo kun estonteco

Unuafoje okazis en Havano kongresa Tago de la Libro, kiam eldonejoj kaj aŭtoroj havis ŝancon renkonti la publikon kaj varbi intereson por siaj verkoj. La komenco estis modesta. Nura kvindekda homoj konsistigis efektive pli malgrandan publikon ol oni povis esperi – aparte se oni konsideras la furoran sukceson de la Libroservo!

Cetere estis eble mispaŝo, dediĉi la plej grandan atenton al du reeldonoj, eĉ se gravaj. Pri *La danĝera lingvo* ĉiuj jam scias, kaj la prezento de Ulrich Lins pri ties dua eldono, ĉe Progres en Moskvo, aldonis nur kelkajn personajn nuancojn. La itala eldonejo Edistudio elektis enfokusigi la freŝe reaperintan *Kredumino, sinjorino!* de Cezaro Rossetti, same bone konatan al literaturemuloj. Eĉ la nova Proza Antologio, *Trezoro*, konsistas (kompreneble!) precipe el malnovaj verkoj, tiel ke oni ricevis iom malviglan impreson pri la ĉeffluoj de la nuntempa eldonagado. Aliflanke, la klara kaj impresa deklamado de eltiraĵoj fare de Vida Jerman donis vivan varion al la tuta aranĝo.

Partoprenis du relative grandaj eldonejoj – la menciita Progres kaj Ĉina Esperanto-Eldonejo, kies respektivaj aktivuloj A. kaj E. Ŝevĉenko kaj Liu Lin sciigis nin pri siaj problemoj kaj eldonplanoj, tamen ne tre detale. Poste venis malpli konataj verkoj kaj eldonejoj el Jugoslavio, Nederlando kaj Bulgario. Tiu parto, kiu povus fariĝi tre interesa kaj fruktodona, kaj por la publiko kaj por la eldonejoj mem, estis bedaŭrinde mallongigita pro mislokita muzika

paŭzo. Kvankam Nikolai Lozgaĉev kaj Flávio Fonseca abunde meritas sian publikon, mi mem preferus aŭskulti ilin aliloke kaj doni pli da tempo al la centra temo. Se en venontaj jaroj partoprenos pli da eldonejoj, oni eble devos eĉ dividi la Tagon en kelkajn partojn por ebligi la prezenton de ĉiuj verkoj laŭmerite.

La kritikoj ne forprenas de la inda koncepto de la Tago, nek de la ĉarma

gvidado fare de Spomenka Ŝtimec. Kaj menciindas, ke ĝi fruktis ankaŭ alimaniere, en kunsido de eldonistoj el Kubo, Bulgario, Hungario, Jugoslavio, Norvegio kaj Sovetunio. La partoprenantoj interŝanĝis ideojn pri kunlaboro, eventuale kadre de fondota “unuiĝo de E-eldonistoj”. Por informoj pri ĝia agado ĝis la UK en Bergeno, turnu vin al la UEA-estrarano pri kulturo (vd. la internan kovrilon).

Esperantologia Konferenco:

Traduki kaj konservi

Kiel ĉe kelkaj aliaj tradiciaj aranĝoj, oni spertis en la Esperantologia Konferenco la prezon pagendan pro kongreso ekster Eŭropo. Simple ne venis sufiĉe da homoj, kaj precipe da iom spertaj esperantologoj, por viviĝi la aranĝon. La konferenca gvidanto, Humphrey Tonkin, tamen profitis la ĉeeston de sovetianoj kaj kubanoj, kiuj kontribuis centre al la programo.

En la unua parto, Elena Ŝevĉenko parolis detale kaj el propra sperto pri la tradukaj problemoj en sociologiaj kaj historiaj verkoj pri Sovetunio. Ĉu ekzemple por la reformprogramo “pjerestroika” oni uzu la tradukon “rekonstruo”, la esperantigon “peres-

trojko” aŭ la latinliteran rusan formon? Al la diskutoj kontribuis R. Eichholz, O. Prytz, I. Koutny kaj aliaj, tamen ne atingante samopiniecon.

En la dua parto, Tonkin mem prezentis referaĵon pri la demando, ĉu kaj kiumaniere la uzo de Esperanto kiel dua lingvo povus ŝirmi la kulturan identecon de ĝiaj uzantoj. Liajn optimismajn konkludojn pri tiu eblo tamen malfortigis la praktikaj duboj, ĉu la movado atingos sufiĉe fortan pozicion por reale influi la potencrilatojn en la mondo. Siajn opiniojn pri la sekvenda vojo donis i.a. J. Edwards kaj O. Raola, en diskuto kiu epilogis la kongresan temon.

Ŝancoj por pluvivado

Kelkaj bonvenaj ŝanĝoj aperis en la ĉi-jara Tago de la Paco, kiu allogis okdekda kongresanoj al matena diskuto pri "Pluvivado en la 21-a jarcento". Unue, haveblis diskut-dokumento (el Unesko-konferenco pri tiu temo), por ke la partoprenantoj iom preparu sin. Due, la aranĝo okazis en la komitata salono, do kun la formo de "ronda tablo" anstataŭ prelego aŭ formala kunsido. Trie, post unu horo en la pleno, malgrandaj diskutgrupoj ebligis al la restanta kvardeko da partoprenantoj pli libere interkonatiĝi kaj esprimi siajn ideojn. Kvara novaĵo bedaŭrinde ne realiĝis: oni invitis kuban verkiston paroli al la kunsido, sed li estis vokita lastmomente al restado en Germanio.

En lia loko parolis unue la gvidanto de la Tago, Mark Fettes (Nederlando), por enkonduki la temon, kaj poste Evaldo Pauli (Brazilo), Märtha Andréasson (Svedio), Bernhard Westerhoff (FR Germanio), Clovis Portes (Brazilo)

kaj Petro Rulofido (Nederlando). Ĝenerale oni kritikis la dokumenton kiel tro teorian, kaj ne sufiĉe ligitan al pozitiva agado. Similan emfazon faris poste la laborgrupoj, kie ja ĉiuj partoprenis. Pluraj ĉeestantoj parolis pri siaj propraj lokaj agadoj – plantado de arboj en Israelo, purigo de riveroj en Ukrainio, premkampanjoj kontraŭ la importado de tropika ligno, civitanaj interŝanĝoj kun Angolo. Ulrich Lins trafe resumis la ĉefan emfazon, dirante ke necesas konkretaj instigoj al individuoj, partopreni en tiaj bazaj agadoj kaj ne senesperigi pro la vasteco de la problemo. Laŭ li, estas senutile alvoki al radikala ŝanĝo; aliflanke la repaciĝo inter okcidento kaj oriento jam malfermas novajn ŝancojn.

Eble notindas, ke la interveno de la ĝenerala sekretario de Mondpaca Esperantista Movado ne prenis inspiron de tiu repaciĝo, sed anstataŭe konsistis el malnova retoriko pri la rilatoj inter Kubo kaj Usono. Post

unu-du minutoj la partoprenantoj komprenigis, ke ili ne konsideras tion taŭga kontribuo al la temo. Ĝenerale la spirito de la kunveno estis tre pozitiva. La precipa manko? Iu praktika flanko, kiu donus al la interesitoj utilajn sciojn por reporti hejmen. Espereble tio ekzistos jam de la venonta jaro.

Posttagmeze, trideko da homoj venis al kunsido pri la propono starigi internacian Uneskon-klubon. Mark Fettes denove enkondukis la temon, skizante la strukturon de Unesko kaj ĝian rilaton al la 2 500 ekzistantaj Unesko-kluboj. Poste li prezentis kelkajn ideojn pri la funkcio de tia organizaĵo en la Esperanto-movado kaj petis reagojn. Pluraj homoj diris, ke ili apogas la ideon sed skeptikas pri la realigo, precipe ĉar tiom da esperantistaj iniciatoj fiaskas post la unua entuziasmo. La plej senhezita subteno venis de Bulgara Esperanto-Asocio. Estis konsentite, ke grupo de interesitoj kunlaboros dum la venonta jaro, cele al definitiva fondkunveno en Bergeno. Kiu volas ricevi pliajn informojn kaj kontribui siajn ideojn, kontaktu Mark Fettes, Vignolastraat 48, NL-3066 BP Rotterdam, Nederlando.

Belartaj Konkursoj:

Ses laŭroj por Georgo Kamaĉo

La juna hispana verkisto, nomita Nova Talento en 1989, atingis unikan pinton en la Belartaj Konkursoj 1990. Unuafoje en la proza branĉo, unusola aŭtoro kaptis ĉiujn tri premiojn; kaj ankaŭ la tuta rikolto de premioj por Kamaĉo egalas la rekordon*, ĉar aldoniĝis du premioj pro poezio kaj honora mencio en la esea branĉo. En la drama sekcio li cetere ne konkursis. . . .

Angloj kaptis la du aliajn ĉefpremiojn: Krys Ungar sekvis sian lastjaran venkon en la poezia branĉo per eseo pri unu el siaj antaŭuloj, Marie Hankel; kaj Timothy Brian Carr – multfoja laŭreato en la Internaciaj Floraj Ludoj de Katalunio – fine rajtas porti ankaŭ la Belartan kronon.

*En 1962 Marjorie Boulton (Britio) gajnis kvin premiojn kaj unu honoran mencion en kvar branĉoj. La sama aŭtoro gajnis en 1957 kvin premiojn en tri branĉoj.

La Komisiono esprimis sin kontenta pri la ĉi-jara nivelo en la branĉoj poezio (56 verkoj de 28 aŭtoroj el 19 landoj), prozo (26 verkoj de 13 aŭtoroj el 11 landoj), kaj eseo (10 verkoj de 10 aŭtoroj el 9 landoj). La esceptan kvaliton de tiu lasta branĉo cetere montris la tri honoraj mencioj, kiujn la ĵurio elektis aldoni al la ĉefpremio. La teatra branĉo (6 verkoj de 5 aŭtoroj el 5 landoj) estis malforta, kiel kutime: nur sesfoje en la lastaj 20 jaroj oni aljuĝis la unuan premion. Lamis ankaŭ la branĉoj kanto kaj fotografio (po du konkursantoj).

La prezento de la premioj en Havano estis tre bone gvidata de Spomenka Štimec, estrarano pri kulturo, kaj Osmo Buller, konkursa sekretario. Apartan intereson alportis la laŭtleĝado de kelkaj komentoj de la juĝistoj, kune kun fragmentoj el la premiitaj verkoj. La plimulton de tiuj verkoj vi cetere povos legi en la oktobra numero de *Esperanto*.

Belartaj Konkursoj de UEA 1990

POEZIO: Unua premio: Timothy Brian Carr (Britio) pro *El "La vivo de poeto"*; Dua premio: Georgo Kamaĉo (Hispanio) pro *Ĉies...*; Tria premio: Georgo Kamaĉo pro *Nokto...* Honora mencio: Gunnar Gällmo (Svedio) pro *Kanto de ĵaluzo* kaj Timothy Brian Carr pro *Maja idilio*.

PROZO: Unua premio: Georgo Kamaĉo pro *Kia la semo*; Dua premio: Georgo Kamaĉo pro *Mensogo de l' okuloj, mensogo de l' oreloj*; Tria premio: Georgo Kamaĉo pro *Sendestine*. Honora mencio: Eŭgeno Belonenko (Sovetunio) pro *La kiso de la eterno*.

TEATRO: Unua premio ne aljuĝita; Dua premio: István Ertl (Hungario) pro *Gepelmele*; Tria premio: Karolina Gilmore (Britio) pro *Venontjare en Parizo*.

ESEO: Premio Luigi Minnaja: Krys Ungar (Britio) pro *Goje sonu mia kanto: La vivo kaj verkoj de Marie Hankel*. Honora mencio: Mark Fettes (Nederlando) pro *Demokrateco, neŭtraleco, aŭtonomeco: La ideologia evoluo de Universala Esperanto-Asocio*, Arnoldo Aguila (Kubo) pro *Poezio ne estas matematiko*, kaj Georgo Kamaĉo pro *Amika rondo varma, aŭ Pri la verda junularo*.

KANTO: Premio An-okin pri Kanto: Klara Mikola (teksto) kaj László Garamvölgyi (muziko) el Hungario pro *Almozul'*.

FOTOGRAFIO: Neniu premio aljuĝita.

PREMIO NOVA TALENTO: Ulrich Becker (Germana DR) pro la prozaj verkoj *Bagateloj (komedio en ses aktoj)* kaj *Rezolucio 11.59 h*. Lia nomo estos gravurita sur la pokalo Henry Harabagiu, konservata en la Centra Oficejo de UEA.

INFANLIBRO DE LA JARO: *Pipi Ŝtrumpolonga* de Astrid Lindgren, tradukita de Sven Alexandersson, eldonita de Eldonejo Progreso (Svedio).

Komisiono pri Belartaj Konkursoj de UEA
V. Benczik, prezidanto; O. Buller, sekretario

Vera kolego de Zamenhof

En 1990 jam la kvaran fojon la Estraro de UEA aljuĝis la Premion Deguĉi. Tiu premio distingas laboron pere de Esperanto por la antaŭenigo de interpopola kompreniĝo kaj solidareco; ĝin fondis kaj malavare subtenas la japana religia movado Oomoto, de kies fondinto ĝi portas la nomon. En antaŭaj jaroj la Premion ricevis Hans Bakker (Nederlando), pro siaj laboroj en Afriko; Ralph Harry (Aŭstralio), pro sia multjara aplikado de Esperanto kiel internacia juristo kaj diplomato; kaj Internacia Kultura Servo (Jugoslavio), pro sia uzado de Esperanto por internaciaj aranĝoj en Zagrebo dum dudeko da jaroj.

En 1990 la Premion ricevis Jacques Tuinder (Nederlando). La premiito ne povis ĉeesti en Havano, sed ni kontaktis lin hejme kaj jene lasas lin prezenti sin al vi.

“En la jaro 1966 mi legis vere eldormigan artikolon pri giganta mondproblemo, nome la grandkala kaj rapide kreskanta nenecesa blindeco en landoj ekonomie malfortaj: blindeco preventebla aŭ operaciebla. Temis pri

milionoj kaj milionoj da homoj, kaj la serioza konkludo – statistike formulita – resumiĝis per la pensiga konstato, ke tri el kvar blinduloj estas *senbezzone* vidhandikapitaj.

“Mi legis pri organizaĵo invitanta helpemulojn adopti kunhomon okul-operacieblan en orienta Afriko, kaj mi decidis fari tion private. Poste mi daŭrigis propagandi la aferon inter geparencoj, genajbaroj, geamikoj k.s. . . . Subite mi konstatis, ke d-ro Zamenhof mem estis okulisto, kiu noble helpadis al multaj okulpacientoj en sia ĉirkaŭaĵo. Jen do rimedo por ‘eksterigi’ la t.n. internan ideon, kiun li ligis kun la internacia lingvo.

“Tiel naskiĝis agado, kiu vigliĝis post alvoko en la Esperanta gazetaro: *Esperantistoj, esperigu esperantojn!* – t.e. Agado E3. Kun gesamideanoj kaj aliaj homoj de bona volo, ni dum preskaŭ 24 jaroj realigis diversajn modestajn projektojn por okul-handikapitoj en la Tria Mondo. Ni komencis sendante du surradajn klinikojn al Kenjo kaj Malavio. Poste mi konatiĝis kun nederlanda kuracisto

laboranta en Kamerunio, kaj per la relative malgranda sumo de 100 000 guldenoj ni sukcesis tie konstrui 40-litan hospitaleton. Tie oni cetere ankoraŭ trejnas flegistojn pri oftalmologio. Nia ĉefa celo estas ĉiam: ebligi al la homoj labori en la propra lando.


“En tiuj 24 jaroj ni realigis 16 projektojn en 12 landoj. Ili estis diversspecaj, depende de la bezonoj de la homoj – ekzemple en Nikaragvo ni provizis aŭtobuson al naŭ blindaj lernantoj en muziklernejo, kiuj alimaniere ne povis veturi al la klasoj. En Nikaragvo troviĝas ankaŭ brajla presejo sub nia aŭspicio. Same kiel por ĉiuj projektoj, oni regule raportas al ni pri ĝia agado: tio estas unu el la kondiĉoj por nia helpo. Mi devas ankaŭ koni la homojn, kaj ili devas disponi pri la bazaj kondiĉoj por plua laboro. Lastatempe, pro la laboro de Hans Bakker, disvastiĝis alia formo de helpo: pli ol dekfoje Agado E3 sendis novajn okulvitrojn al novaj esperantistoj en evolulandoj. Por tio necesas nur, ke oni havigu al ni validan recepton de oftalmologo.

“Bedaŭrindege, la blindeco intertempe eble triobligis, malgraŭ iniciatoj kaj fortostreĉoj de multaj flankoj. Kaj, kvankam Esperanto estis centra elemento de mia agado, mi ankaŭ tiurilate ne estas ĉiutage kontenta. Mi devis konstante batali kontraŭ la indiferenteco de la esperantista publiko. Estus multe pli grave, se oni mem transprenus la taskon informi la mondon, mem subtenus lokan okul-kuraciston, anstataŭ nur sendi al mi kelkajn guldenojn. Kaj kompreneble mi mem ne povas daŭrigi eterne. Mi havas ankaŭ aliajn celojn en la vivo, kaj Agado E3 formiĝas preskaŭ mian tutan liberan tempon. Mi promesis al mi ĉesi post 25 jaroj. Eble alia homo transprenos.

“Por mi kiel iniciatinto kaj ĝisnuna kunordiganto estas tamen granda ĝojo sperti, ke UEA kaj Oomoto agnoskas, per konsiderinda premio kaj oficiala dokumento, la ideon kaj idealon laŭ la spirito de oftalmologo d-ro Esperanto: doni iom da espero al tiuj, kiuj esperas (re)vidi aŭ pli bone vidi. La kvar mil guldenoj de la premio jam survojas al hospitalo en la sudafrika ‘hejmlando’ Bophuthatswana en la formo de okulkuracaj instrumentoj.”

Jacques Tuinder estas alskribebla ĉe Henegouwenlaan 35, NL-1966 RH Heemskerk, Nederlando. La poŝtbanka konto de Agado E3 estas 10 20 100.

Jacques Tuinder laboras jam de 24 jaroj por helpi al vidhandikapitoj en la Tria Mondo.



Unuafoje ekster Eŭropo

Ekde la havana UK, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) denove membras plene en UEA, kaj laŭ aparta interkonsento okupiĝados pri la internacia instruado de Esperanto. Specialan signifon havas do la fakto, ke lige kun la UK ĝi unuafoje konferencis ekster Eŭropo. Pri la rezultoj kaj perspektivoj ni parolis kun ĝia vic-prezidanto Stefan MacGill.

RE: Se unue paroli pri la Tago de la Lernejo en Havano, vi ja taksis ĝin pli sukcesa ol tiu en Brajtono, ĉu ne?


SM: Jes, sed tio ne signifas multon! Nu, ni havis plenan ĉambron, kun sepdeko da homoj, kaj ĉiuj sufiĉe aktive partoprenis. Fakte estis pli da aferoj por diri, ol estis tempo por diri ilin. Ekzemple mia interveno – “Kiomgrade eblas internaciaj lernolibroj?” – spronis tutan amason da homoj reagi, sed multaj ne sukcesis. La salonkontrolistoj ja estis tre rigoraj pri la horo.

RE: Kubanoj surprize mankis en multaj kunsidoj. Ĉu pli konsiderinda nombro venis al via aranĝo?

SM: Ne, tre malmultaj – nur du aŭ tri. Ĝenerale tiuj, kiuj kompetentis, ne havis tempon. Aliaj latinamerikanoj ja aktive intervenis, ekzemple el Meksikio kaj Brazilo. La temo ŝajnis esti interesa por ĉiuj – la influo de la nacia lingvo sur la lernadon de Esperanto, kaj kiel adapti instrumentojn kaj lernolibrojn por korekti tiun influon. Ni sukcesis kunmeti plenan programon eĉ sen la homoj, kiuj devus gvidi ĝin! Fakte ni havis nur tri estraranojn surloke.

RE: Jes, kaj nur 35 homoj venis poste al via konferenco en Hanabanilla. Ĉu kun tia nombro vi povus nomi ĝin sukceso?

SM: Iusence jes. Tiuj, kiuj venis, estis tre ĉeestemaj: malgraŭ ĉiuspecaj eksteraj allogaĵoj, neklimatizitaj ĉambroj kaj simile, al ĉiuj kunsidoj regule venis dudekkvino da homoj. Tio estis tre grava, ĉar denove ni pli-malpli kompilis la programon surloke . . . ni faris serion de 20-minutaj truoj kaj petis la homojn plenigi ilin. Tio bone funkciis. Sed mi bedaŭras, ke Kuba Esperanto-Asocio ŝajne ne subtenis la partoprenon de kubanoj: venis nur kvin, ĉar la kosto, speciale por dua semajno aldone al la UK, estis verŝajne tro por la plimulto. Nu, almenaŭ la Ĉe-seminario sukcesis. Kvin homoj trapasis ĝin: Atilio Orellana Rojas (Argentino), Roberto Resende



ILEI kongresis en spektakle bela loko.

kaj A. A. Alves Filho (Brazilo), Marin Băcev (Bulgario), kaj Oliver Mazodze, kiu estas zimbabvano studanta en Kubo. Ĉar ankaŭ Băcev pasigis multajn monatojn tie, oni preskaŭ povus diri, ke ni trejniis nur latinamerikanojn . . .

RE: Onidire la kondiĉoj estis sufiĉe bonaj.

SM: Jes, estas interese, ke hotelo de tiu grandeco pretas okupiĝi serioze pri Esperanto. La du klasĉambroj, kiujn ili disponigis al Kuba Esperanto-Asocio, estas laŭ kubaj kondiĉoj eĉ tre bonaj. Kaj la stabo estis tre helpema . . . Ni

kompreneble diris al ili, ke ili ne atendu milojn da vizitantoj pro Esperanto, sed tio ŝajne ne ĉagrenis ilin. Estas ja belega loko. Oni povis ekskursi sur la lago, aŭ sur la montoj, aŭ ĝis la urbo Trinidad. Kaj la partoprenemo de la homoj ebligis, ke ni – fakte Marin Băcev – kunrastu iom da talentuloj por fari gajan vesperon. Mi kredas, ke ĉiu estis kontenta je la fino.

RE: Sed ĉu la konferenco portis rektan utilon al ILEI mem?

SM: La malmulteco estis ege ĉagreniga. Ankaŭ en Eŭropo kutime partoprenas nur cent homoj . . . kaj ofte la samaj. Estas multe tro klubece, eĉ klikece. Ni devas trovi rimedojn por allogi novajn homojn, precipe la junajn; iel krei programon, kiu altiras ilin. Sed tio estos tasko por pluraj jaroj.

El Kubo ni reportis kelkajn bonetajn ideojn. Ĉiuj niaj aktualaj projektoj estas diskutitaj . . . la supera nivelo de la Internaciaj Ekzamenoj, financo, aktualigo de la instrumaterialo ktp . . . kaj ankaŭ la kadrotemo estis utila. Estas la ideo de Symoens, ke ni daŭre kaj sisteme traktos la problemon de “naciaĵoj en la instruado de Esperanto” dum la venontaj jaroj. En ĉi tiu unua traktado ĝi montriĝis eĉ timige fascina . . . ĉiu, ĉu instruisto, esperantisto, gramatikulo havis ion por diri. Do, sufiĉe utila semajno. Mi persone ne bedaŭras, ke ni venis al Kubo, eĉ se la nombro ne estis impona. Ni akceptis la defion forlasi niajn eŭropajn radikojn, kio estas granda paŝo por eta organizaĵo sen profesia oficejo. Kaj mi ege esperas, ke ni denove kuraĝos fari tion post kvar jaroj. Laŭ tio, kion mi aŭdas, la korea movado estas sufiĉe forta por gastigi ankaŭ nin.

**La 25-a ILEI-Konferenco
okazos en 1991
tuj post la 76-a Universala Kongreso
en Voss, Norvegio
(ĉ. 100 km oriente de Bergen).**

La malfermo okazos dimanĉe la 4-an kaj la fermo la 8-an de aŭgusto. Forveturo el Voss hejmen la 8-an vespere aŭ la 9-an matene. Pliaj informoj troviĝas en la aliĝilo, kiu aperos en la 3-a numero de *Internacia pedagogia revuo (IPR)*, oktobro 1990.

Arta programo:

Aŭskulti maratonon

Svinga ritmo. Manklakado. Du spotoj – traf! traf! – kaj jen la enkondukantoj de la Internacia Vespero, du viroj elegante vestitaj sur la malluma scenejo. La muziko ekmelodias. Ili malfermas la buŝojn . . . kaj akra kuba akcento ŝiras la nervojn kaj atendojn. “Vivu doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof!” Ankaŭ

la vortoj ne tre kuraĝigas esperi pri altnivela kultura programo.

Feliĉe la ĉefa prezentanto de la vespero, Margarita Reina, jam pli regas la prononcon, kaj la kontribuantoj plejparte evitas verdstelajn ŝablonaĵojn. La kutima problemo – tro da muziko – ja restas. Fakte la organizantoj estis

“La Fingretoj”, kuba infanensemblo, ĉarmis ne nur en la Internacia Vespero sed ankaŭ dumtage en la kongresejo.



Spektaklo sen subtekstoj

Ion pli kontrastan al la Nacia Vespero en Brajtono oni malfacile imagas. Kelkdeko da profesiaj dancistoj kaj kantistoj surscenigis dum du horoj la historion kaj kulturon de Kubo, en belega kaj bunta spektaklo. Neniu povis dubi, ke ni rigardas unu el la pintaj artensembloj de la lando. Ĝenis nur unu manko: iel la reĝisoroj sukcesis malatenti la lingvoproblemon.

Komence tio ne ŝajnis grava. La sovaĝa dancado de la indianoj cedis al sufoka soleneco de la kristanaj misiistoj, kiun siavice sekvis pasia, sensama celebros de la rasa kunfandiĝo en la kariba insulo. Tiom oni povis senvorte kompreni. La graciaj movoj de la dancistoj, la trafa uzo de lumo kaj koloro kaj la ŝanĝiĝanta muziko kaptis kaj tenis la intereson.

Tamen iom post iom la kantoj kaj komentario pligraviĝis. Impona kontralto priantis dum minutoj ion, kion mi supozas esti la mizeroj de la sklaveco, sed eblis neniun certeco. Dancistoj aperis kaj malaperis, kostumoj aliĝadis, kaj mi certas ke baldaŭ la tuta spektantaro, krom hispanlingvanoj, perdis komplete

la fadenon de la okazaĵoj. Ankoraŭ la nekomprenon iom kompensis belegaj scenaranĝoj laŭ la kolonia epoko, kun elegantaj vestaĵoj kaj amuzaj interŝanĝoj inter la viroj kaj virinoj. Tiel daŭris ĝis la paŭzo.

Mi, kiel supozeble multaj aliaj, atendis postpaŭze la daŭrigon de la historio, kiu takseble atingis la 19-an jarcenton. Sed ve! nur plilongiĝis la vico de nekompreneblaj kantoj kaj diversstilaj dancoj, por kapti kies nuancojn mi ne sufiĉe fakulis. Kvazaŭ hipnotite antaŭ televido, ni sidis dronante en muziko. Apud mi, du lacaj vojaĝintoj endormiĝis. Mi mem fuĝis en pensojn, kiel solvi tiun lingvoproblemon, fine decidante por projekciitaj tekstoj sur granda ekrano apud la scenejo. Solvo pure teoria, kompreneble, ĉar la okazo neniam ripetiĝos . . . La muziko kresĉendis al fino, dancistoj inundis la scenejon, kaj la dormintoj vekigis. Ŝtormo de aplaŭdoj.

Kapture ni kune stumblis ĝis la aŭtobusoj. Estis ja unika vespero, plena je arto. Sed kiom, mi demandas min, ni lernis pri la kuba kulturo?

multe tro cedemaj al du grupoj de kubaj infanaj kantistoj kaj dancistoj sub la gvido de María Álvarez Ríos. “La Fingretoj” rikoltis entuziasmajn aplaŭdojn per sia unua apero (kiam ja elstaris la kristale klara kantado de unu el la knabinoj). Tamen la dua apero jam malpli ĉarmis, kaj la groteska prezento de “lambada”-danco en la tria programero trostreĉis la paciencon de la spektantoj.

Aliaj kubaj partoprenantoj meritas gratulojn. La profesiaj kantistinoj María de Lourdes García kaj María Esther Pérez ravis per klasikaj arioj, kun piana akompano de Juan Esperosa. Ankaŭ Miriam Ramos, konata jam el la roterdama UK, montris mirinde belan voĉon kaj elparolon. Profesia aktorino Georgina Almanza donis iom da vario per deklamo de la poemo “Latinamerika ‘Patro Nia’”, kiun malhelpis nur ŝia tro unutona pasieco. Plaĉis ankaŭ la gitar-kanzono duopo Argelio kaj Maritza Guadarrama. Kaj por tiuj, kiuj ne ŝatis la erotikan dancadon de Sonia Calero, ĝueblis almenaŭ la akompana virtuoza tamburado.

Alilande, kelkaj novuloj

Inter la eksterlandaj kontribuantoj estis kelkaj jam konataj kaj ŝatataj – la bulgara ĥoro “Patruja Koro”, rusaj pianistoj-kantistinoj Elena Puĥova kaj Galina Staneŝnikova, jugoslava aktorino Vida Jerman kun poemoj de kuba nacia poeto Nicholas Guillén, kaj kompreneble la dekjara Internacia Esperanto-Ĥoro sub gvido de Dimitar Terziev. Tiuj fidelaj artistoj donis solidan kernon al la vespero. Ĝin pliinternaciigis novaj voĉoj kaj vizaĝoj, kiel la kantistinoj Emilia Andonova (Bulgario) – kies arton ni jam ĝuis en la marda koncerto –, Ibis Soares (Brazilo), kaj Jenny Bishop (Britio). La nekutima spektaklo de japana magiistino, “s-ino Ĉokolado”, plene kaptis la spektantojn. Kaj aparta plezuro por sekvantoj de la originala E-muziko estis la persona apero de Flávio Fonseca (Brazilo), kiu kantis kelkajn proprajn komponaĵojn, interalie el sia plej nova kasedo *Aerlumo*.

Ĉu do sukcesa vespero? Jes . . . kaj ne. Plej ofte mankis vera rilatado inter la scenejo kaj la spektantoj: tia ekscita, gaja etoso de partopreno, kian sukcesus estigi sperta kaj lerta prezentisto aŭ iu vigla grupo kiel “Kajto”. Mankis kelkaj nemuzikaj eroj, laŭeble humuraj, por doni ekvilibron. Kaj mankis . . . fino: tri horoj nepre tro longas! Jen kelkaj rimarkoj por la bonvola atento de norvegoj, ĉeĥoj kaj similaj, kiuj ja povus trovi ankaŭ imitindaĵojn en la kuba modelo.

Recenzo ĉe bushaltejo

“Mi spertis pli da arto kaj teatro dum la kongreso ol dum la tuta jaro!”

“Ĉu vi povas diri ankaŭ, ke vi ĝuis la sperton?”

“Jes, nepre, kvankam ja iujn aferojn pli ol aliajn. Ekzemple, Vida Jerman kaj Saŝa Pilipoviĉ en “Amo per proverboj” de brazilano Arturo Azevedo – tio estis tro malfacila por mi.”

“Ĉu? Ankaŭ mi aŭskultis kaj trovis la prezenton brila. Couto Fernández bonege tradukis la multajn popoldirojn, kaj mi ofte ridis pro la interludoj de tiuj du profesiaj geaktoroj. Kompreneble povus helpi, ke mi jam rekonis la pli multajn saĝaĵojn el la unuaj kelkaj vortoj kaj jam sciis, kio venos . . .”

“Nu, ja – eble mi devus reiri al la studado de mia Proverbaro! La kongreso vere konsciigas min pri kelkaj mankoj en la vortprovizo . . . Aliflanke ne estis nur mi, ĉar ankaŭ la salono tute ne taŭgis por tiu prezento.”

“Tie vi pravas. Feliĉe la poezia deklamado de la sama paro ne suferis samgrade, ĉar ankaŭ ĝi estis ege aŭskultinda.”

“Jes, mi hontas diri, ke antaŭ la kongreso mi tute ne konis la nomon de Nicolás Guillén. Almenaŭ ion mi lernis pri la kuba kulturo! Samkiale mi ŝatis la monodramon de Georgina Almanza, *Eksterordinaraj deklaroj de Rosa Penderton* de José Antonio Rodríguez, kiu donis al ni belan ekzemplon de la teatra arto de kubanoj.”

“Same kiel la aktorino mem, kiu ja rolis centre en la kuba teatra vivo dum sufiĉe longa tempo!”

“Jes, tio estis privilegio por ni, aŭskulti ŝin en Esperanto. Domaĝe nur, ke denove la salono tiel maltaŭgis! Eble pro tio, el ĉiuj teatraĵoj mi plej ĝuis la dramon de Bulgara Esperanto-Teatro.”

“Ha jes, BET – ili ludis ion novan, ĉu ne?”

“Mi ne scias, la unuan fojon mi spektis ilin. Temis pri *Mi ne plu konas vin* de Aldo de Benedetti. Vere tre amuza – kvankam ĉiam estas iu, kiu deklaras ke ‘ĝi ne estas sufiĉe serioza’ ktp ktp. Mi ne komprenas, kial oni ne rajtus distriĝi ĉe kongreso.”

“Nu, mi devas diri, ke ankaŭ mi ne kuras por vidi la bulgarojn. Mi preferas dramojn kun pli da substanco . . . Tamen ili ĉiam havas akceptindan nivelon.”

“Jes, la scenigo kaj elparolo estis vere bonaj. Kiel mi diris, ili ne provis uzi unu el la kongresaj salonoj sed trovis veran teatron en la urbo kun multe pli agrablaj kondiĉoj. Cetere, ankaŭ la traduko, de Kunĉo Valev, estis sufiĉe flua, kio gravas por ke oni ĝuu la enhavon.”

“Mi ĝojas aŭdi tion. Estis unu el miaj ĉefaj ĝenoj dum la Internacia Vespere – aŭskulti tiom da fuŝaj versoj. Foje mi preferus, ke oni kantu malpli klare, simple por ne aŭdi la negramatikaĵojn!”

“Ĉu? Mi ne povas diri, ke mi rimarkis . . . Tamen tio pensigas min, ke ofte ĉe niaj kongresoj plej sukcesas la senlingvaj eroj. Ekzemple la Nacia Vespere, kiu estis nekutima, sed ege bona. Aŭ la akvobaletoj, kiun ni sukcesis spekti tuj antaŭ tondroŝtormo en lundo. Aŭ la profesinivela koncerto en mardo.”

“Eble vi pravas. Mi ne scias, kion konkludi el tio por nia prilingva movado . . . Aliflanke, ĉu vi memoras la pupateatron de Roza kaj Miroslav Cvetanov? Ĝuste pro tio, ke ili partoprenigis la spektantojn per simplaj demandoj kaj respondoj, ĝi postlasis tre bonajn rememorojn.”

“Ho, entute mi havas tre bonan impreson pri la ĉi-jara programo. Eĉ ne unu ero estis sub akceptinda nivelo – kvankam mi ja preferus iom malpli de la Internacia Vespere – kiel de ĉi tiu ĉiea atendado, cetere. Uf! Jen venas finfine la buso!”

“Per pacienco kaj fervoro sukcesas ĉiu laboro”: la persista amindumado de Saŝa Pilipoviĉ fine gajnis la konsenton de Vida Jerman en AMO PER PROVERBOJ.



Koncize pri . . .


Dokumentujo: Plaĉis la ujo mem, tre ĉarma tola sako, sed la enhavo estis magra ĉi-foje. Mankis eĉ mapo de la kongresa urbo Havano. La kubanoj estis pene ellaborintaj originalan frazaron Esperantan-hispanan, sed tiu bedaŭrinde pasigis la kongresan semajnon en la presejo, devigante la kongresanojn kontentigi per diversaj malpli utilaj objektoj.

Bankedo kaj Balo: La unua, en la bela kongreseja restoracio, kontentigis laŭ la ebloj de la kuba kuirarto. La dua, planita por la sama vespero, estis komplete fiasko. Ankoraŭ neniuj povas klarigi, ĝuste kio okazis aŭ ne okazis por malebligi ĝin, sed ĝi nedisputeble malaperis sen lasi spurojn. Busoj devis porti la balemulojn hotelen je la 9-a vespere.

Komunikiloj: Bona eĥo enlande: la ĉefpaĝoj de la gazetoj, inkluzive de la plej gravaj; la televidaj novaĵoj, plus almenaŭ unu duonhora informa programo pri la movado kaj elsendo de la filmo *Esperanto* de R. Dobrzyński; la radionovaĵoj, inkluzive de la fremdlingvaj elsendoj de Radio Havano. Eksterlande: tute neadekvataj preparoj surloke, ege malgranda reeĥo de nekubaj ĵurnalistoj. Bruĉjo Kasini kaj Ivo Durwael kunlaboris por tamen iel provizi informojn al la ekstera mondo per telefakso, kaj Kasini meritis apartan gratulon pro rapida verkado, tradukigo kaj dissendo de komunikoj komence kaj fine de la kongreso.

Kongresa Kuriero: Troviĝis tri volontuloj por kunsuferi maldormon dum ses noktoj el sep, produktante la kongresan bultenon. Temas pri Andy Künzli, Bruĉjo Kasini kaj LKK-ano Orlando Raola, kiuj preskaŭ ne videblis dum la kongreso pro sia luktado kun " unusola komputilo, unusola tajpilo, unusola tondilo, unusola fotokopiilo kaj unusola paperfolio", laŭ priskribo en unu el la Kurieroj. La rezulto estis bona kaj akurata.

Infana Kongreseto: Ne okazis, pro malmulteco de partoprenantoj. Tion neniuj povis malhelpi, sed kritikinde tamen estas, ke por la kelkaj ĉeestantaj infanoj ekzistis nenio anstataŭa. Eĉ informoj pri ludejoj kaj naĝejoj estis malfacile troveblaj. Feliĉe la infanoj mem montriĝis adaptiĝemaj, kaj en unu tago oni sukcesis aranĝi komunan ekskurson, i.a. al la bestoĝardeno.



Ivo Durwael, estrarano pri informado, admiras la frontpaĝan prezenton de la kongreso en la ĉefa kuba ĵurnalo GRANMA.

Ekzamenoj: La Internaciajn Ekzamenojn de ILEI/UEA trapasis ses kandidatoj el Hispanio, Meksikio, Ĉilio, Brazilo kaj FR Germanio: du je la elementa, kvar je la meza nivelo. Ĉe la ILEI-konferenco en Hanabaniĝis du pliaj. En la antaŭaj 18 monatoj jam sukcesis 67 kandidatoj el 15 landoj en 13 ekzamensesioj.

UEA-kunsidoj: La pli multajn oni ne povus nomi sukcesaj. Ofte ne okazas antaŭpreparo, kaj kompreneble nur surloka spontaneco ne portas rezultojn. Tiaj senfruktaj babiloj karakterizis ekz. sciencan aplikadon, virinan agadon kaj sporton (kien ja venis preskaŭ neniuj). La kunsido pri kongresoj estis okazo precipe por plendoj, pli ol planoj. Ŝajnas, ke la kunsidoj pri kulturo, informado kaj eksteraj rilatoj estis pli sukcesaj, ĝuste ĉar ili baziĝis sur konkreta laborplano de la koncerna estrarano.

Terminologio: Bedaŭrinde neniuj el la ĉefaj aktivuloj de Terminologia Esperanto-Centro de UEA povis veni al la kongreso. Werner Bormann, TEC-konsilanto, akceptis la taskon klarigi la laboron kaj nunan staton de TEC, kiu nun disponas pri oficejo en Zagrebo. Pluraj kubanoj interesiĝis pri kunlaboro kaj esprimis sian bezonon de klaraj gvidmaterialoj kaj konkretaj taskoj. La ĉeestantoj estis invititaj al faka akcepto ĉe la Kuba Akademio de Sciencoj.

Prelegoj pri Kubo: Denove tre popularaj montriĝis la prelegoj pri la kongresa lando, ĉi-foje plenumitaj de Juan Lázaro Besada (etnologio), Julian Angulo Hernández (sano kaj edukado) kaj Orlando Raola Gonzales (kulturo). Ĉiuj prelegantoj tre bone preparis sin. La ĉefa manko estis teknika: nigra tabulo aŭ retroprojekciilo multe helpus por kapti kaj reteni el la pluvo de fremdaj nomoj.

Eksteraj prezentoj: Krom la granda malhelpo, ke la kongresejo estis tute forŝlosita de la urbo, Havano multrilate modelis por publikaj rilatoj. Diversaj IKU-prelegantoj kaj aktivuloj de fakaj asocioj (ekz. sciencistoj, verkistoj, komunistoj) havis okazon renkonti siajn kubajn kolegojn, kun la helpo de interpretistoj. Dum la semajno malfirmiĝis ekspozicio de Esperanto-libroj en la perfekta kadro de la Nacia Biblioteko. La kongresafiŝoj sur la aviadiloj de Cubana havis eble nur limigitan efikon, sed la alumetskatoloj kun la kongresa insigno atingis preskaŭ ĉiun fumanton en tiu ĉefurbo de la cigaro. Efikis ankaŭ la poŝtmarko kaj moneroj, per kiuj la ŝtataj instancoj honoris la kongreson.

Bjalistoka Centro: Roman Dobrzyński kaj Humphrey Tonkin prezidis la kunvenon pri la projekto de granda Esperanto-centro en la naskiĝurbo de

Zamenhof. La ĉ. 50 partoprenantoj aŭdis malkaŝan raporton pri la praktikaj malfacilaĵoj, sed ankaŭ pozitivajn informojn – pri pola Esperanto-kongreso tie kun milo da partoprenantoj, pri kunlaboro kun Akademio Internacia de la Sciencoj kaj Bahaa Esperanto-Ligo, pri subteno de la nova urbestro kaj aŭspicio flanke de Unesko. La ĉefa bezono nun estas mono: Tonkin daŭrigas la varbadon de ekstermovadaj investantoj, kaj dume oni serĉas aĉetantojn-perantojn de la vidbendo *Bonvenon al Bjalistoko!*, donacantojn kaj ĉiuspecajn kunlaborantojn. (Pliajn detalojn peras la Centra Oficejo.)

Azia movado: Okazis du kunvenoj pri la Esperanta movado en Azio. La unua estis por la aziaj asocioj aliĝintaj al UEA: partoprenis Liu Ling (ĈEL), Chong-Yeong Lee (KEA), Yamasaki Seikō (JEI) kaj Parvaz Ghulam Nabi (PakEsA), kune kun estrarano So Gilsu, delegito Joachim Werdin kaj Masahiro Marc Ono el Nepalo. Inter la ĉefaj temoj estis kunlaboro por la sukceso de la Pacifika Kongreso en Ĉingdao, 1992; la sendado de vojaĝantaj instruantoj al aziaj landoj; la edukado de bonaj lokaj gvidantoj de la movado; kaj pli efika interŝanĝo de informoj inter la landaj asocioj. Ĉiuj esprimis opinion, ke necesas zorgi pri la nove fonditaj asocioj en Malajzio, Singapuro kaj Tajvano. Posta publika kunveno donis al ĉ. 35 personoj ŝancon informiĝi kaj fari demandojn kaj proponojn.

Seminario pri informado: Nur duone sukcesis ĉi tiu nova ero, kiu celis trejni aktivulojn pri informado kaj estigi kunlaboron. Pro la programo oni devis dividi ĝin en du partojn, kaj el la 15 partoprenantoj en la unua sesio, nur triono povis veni al la dua, kiu ricevis 10 novajn interesitojn. Temis do kvazaŭ pri du apartaj seminarietoj, el kiuj unu traktis kelkajn bazajn aspektojn de la informado, kaj la alia la specifan teronon de “merkatesploro”: kiel kunmeti demandaron por ekkoni vian publikon. Ambaŭ partojn gvidis Hans Adriaanse, nederlanda fakulo pri merkatesploro, kune kun Ivo Durwael kaj Mark Fettes. Pli ampleksa raporto aperos en *Influo*, la bulteno de la Informa Fakulo (petu ĝin de la Centra Oficejo).

Libroservo: Kun apartaj penoj, UEA sukcesis transporti al Havano sesmilon da libroj, el kiuj du triono vendiĝis dum la kongresa semajno. La prezoj estis forte reduktitaj por doni maksimuman ŝancon al la lokaj esperantistoj,

kaj pro la sama kialo oni akceptis pagon en peso. La tuta vendosumo estis ĉ. 21 500 dolaroj-peso. Ĉiuj nevenditaj libroj cetere restas en Kubo por estonta uzo de la loka movado.

Ekskursoj: Okazis ĉ. 30 ekskursoj kun partopreno de sume 1600 personoj. El ili ĉ. 95 estis partoprenantoj de antaŭkaj postkongresoj en Meksikio, kaj 65 iris al la postkongreso en Playa Girón. Denove la kutimoj de Cubatur sentigis sin: tre malofte la kongresanoj havis ŝancon konatiĝi kun la vivo de ordinara kubanoj, kaj la ekskursaj programoj estis ofte tro ŝtopitaj per ŝablonaj turismaĵoj. Aŭdiĝis tamen tre pozitivaj raportoj pri la meksikaj aranĝoj, organizitaj de viglaj lokaj grupoj kunlabore kun ELNA.


Masaĝisto: Tre populara kongresano estis Masayuki Saionji, la japana el-laborinto de “koksosto-ĝustiga prem-kneda terapio”. Pri ĝi temas lia nova libro (kaj vidbendo) *Orienta speciala diina masaĝo*, kaj la kongresanoj povis mem elprovi ĝian efikecon sur la propraj korpoj (foto). El pluraj entuziasmaj raportoj eblas konkludi, ke la terapio meritas sian rapide kreskantan famon.

Fakaj kunsidoj: Tiuj ĝenerale suferis pro malmulteco de la partoprenantoj, kaj tial verŝajne ne indas listigi ĉiujn (ekzemple tiun de la filologoj, kiu kunmetis la nederlandan peranton kun du scivolaj kubanoj!). Inter la pli

sukcesaj estis la fervojistoj (30 el 15 landoj), blinduloj (10 el 7 landoj, plus 13 akompanantoj kaj interesitoj), etnistoj kaj komercistoj-ekonomikistoj (po 20). Al la kunsido de fakaj asocioj venis reprezentantoj de 12 organizaĵoj.

Latinamerika movado: Preskaŭ cento da kongresanoj ĉeestis la duhoran kunsidon pri Esperanto en Latin-ameriko, kiun gvidis estrarano R. Dobrzyński. Surbaze de diskuto pri la problemoj de la movado – unulingveco de la kontinento, grandaj distancoj kaj malriĉeco – oni venis al konkretaj proponoj, speciale pri kunlaboro kun la nordamerikaj asocioj. BEL (Brazilo) kaj ELNA (Usono) kunlaboros por fari enketon pri la stato de la movado en Ameriko, kaj por la starigo de kontinenta koresponda kurso; komisiono prilaboros strategian analizon; estos pristudataj la eblo produkti televidan kurson en la hispana kaj la projekto de komuna revuo. En 1992 oni celos organizi Tutamerikan E-Kongreson.

Kursoj: La kongresan Ĉe-kurson, sub gvido de P. Grzybowski, finis 28 homoj el 8 landoj. Multaj el la kubaj komencantoj, kiuj ĉeestis la kongreson kelkcentope, verŝajne neniam eksciis pri tiu eblo. I. Szanser gvidis la seminarion por Ĉe-instruistoj, kaj 12 homoj el 5 landoj ricevis ateston pri sia instrukapablo. La konversaciaj kursoj bone sukcesis, dank’ al parolinstigantoj I. Koutny kaj M. Băcev.



Doloro aŭ delico? Ne eblas scii, kion opiniis ĉi tiu kongresano pri la masaĝoterapio de Masayuki Saionji.

Por fosi trezoron

Regis konsterno en la estrarkunsido.

“Je la kvara matene? Ne dankon!”

“Ĉu ni ne rajtas je unu tago de ripozo?”

“Mi ankoraŭ ne vidis la malnovan urbon...”

LKK-prezidanto Castillo delonge kovis planon por la kongresa ekskursita tago. Ĉu ne estus bele, se kelkaj internaciaj aktivuloj vidus la unikan edukistemon sur la Insulo de la Junularo? En ties lernejoj, kun 18 000 gejunuloj el la evoluantaj landoj, la instruado de Esperanto povus havi eksterordinaran signifon. La estraranoj tamen ne dividis lian entuziasmon...

Estis do miksita grupo, kiu alvenis al la flughaveno en malnova saltetanta aŭtobuso je la kvina horo, merkredon matene. Partoprenis kvar estraranoj de UEA, la prezidanto de ILEI, komitatano, la redaktoro de *Esperanto* kaj lia amikino, kaj juna zimbabvano kiu estis lerninta Esperanton ĝuste sur la Junulara Insulo. La grupon gvidis Castillo kaj Lucía Sardiñas. Tiu lasta aranĝis matenmanĝon ĉe iu partia gastodomo, plena je la kuriozaj kaj belaj ceramikaĵoj karakterizaj por la insulo. Vizito al la “Modela Malliberejo” sekvis. Castro kaj aliaj lanĉintoj de la revolucio “gastis” tie, kun kelkaj miloj da krimuloj kaj politikaj akuzitoj. “Mi konis la tiaman estron, li estis mia najbaro,” konfidis Castillo. Iu interesiĝis: “Kio okazis al li poste?” “Kion vi pensas? Li ne vidis la duan tagon de la revolucio.”

La daŭriga vojo kondukis tra kampoj da grapfruktaroj, la plej grava produktaĵo de la insulo. Brilflavaj sferoj pendis lanterne inter la folioj. Subite la buso turniĝis en la enirstraton de lernejo izolita meze de la kampoj. Amaso da gejunuloj sidis ekstere sur la herbo. La buso haltis. En momentoj la sidantaro transformis sin en du vicojn, kiuj aplaŭde bonvenigis la vizitantojn. Aŭdiĝis ritmaj krioj: “Pro la patrio!” estis la plej distingebla. Je miro de la esperantistoj, apuda grupo de knaboj komencis militecan, strikte kunordigitan dancon. Preter la angulo, aro da brunhaŭtaj knabinoj malentuziasme movis siajn korpojn je la takto de tamburo. Malantaŭ ili pendis la portreto de iu soldateca viro: ĉu la ŝtatestro, ĉu revolucia gvidanto? Neniu klarigis. Funkciuloj gvidis la vizitantojn supren

al ceremonia salono, kie ili ricevis teon laŭ la kutimoj de Okcidenta Saharo – ĉar ĝuste el tiu lando venis parto de la lernantoj.

La estraranoj kaŝis sian miron kaj profitis de la okazo por detalaj pridemandoj. Kiom da lernantoj? Kiom tio kostis? Kiel oni elektis ilin? Ĉu ili trovas laboron, revenante hejmen? Ĉu ili povas praktiki sian religion? Apartan atenton ili dediĉis al la lingva demando. La direktoroj hezitis, foje kontraŭdiris sin, sed fine klarigis, ke nur la propran kulturon la lernantoj studas en sia lingvo; ĉio alia okazas hispanlingve. “Ŝajnas al mi, ke fakte la denaska lingvo fariĝas la dua lingvo,” komentis Durwael. La zimbabva studento faris pli rektan demandon: “Ĉu vi akceptus kaj subtenus la instruadon de Esperanto?” Inter amaso da ĝentilaĵoj, eblis diveni malentuziasmon por tiu ideo.

sloganon por la unuiĝo de Koreio. Alparolado en la korea mirigis ilin. Ili respondis afable, tamen singarde. Poste venis la lernejestro kaj kondukis la vizitantojn al la akceptosalono. Sur la muroj Fidel Castro brakumis Kim Il-sung; libroj de la du plenigis la bretojn. Poste oni tamen insistis montri la dancadon de du knabinoj, laŭ la formala kaj delikata stilo de antikvaj dinastioj. Klasĉambrojn la esperantistoj ne vidis.

Kie la lernejoj ne sukcesis, tamen, la interparolado kun la zimbabvano Olivero ja donis al ili impreson pri la sukceso de la sistemo. Trejnita kvin jarojn pri botaniko, li planas reiri post unu jaro kaj okupiĝi pri la riĉa biologia heredaĵo de sia kaj najbaraj landoj. En Kubo li akiris memfidon, kaj pri si kaj pri sia kulturo. Esperanton li jam alproprigis sufiĉe – en unu jaro – por komforte paroli kaj eĉ heziteme



Ĉi tiaj prezentoj lastatempe eksmodiĝis en Eŭropo...

“Esperanto estas bela koncepto, sed aliaj lingvoj estas pli gravaj. Ĉiuj lingvoj helpas la komunikadon inter homaj koroj, ĉu ne?” La korea partoprenanto, So, tamen permesis al si insisti: “Vi pravas, ke per ĉiu lingvo povas disvastiĝi la komunikado inter koroj. Tamen ekzistas preskaŭ tri mil lingvoj en la mondo, do ni bezonas komunan lingvon.” Kaj tie haltis la diskuto.

En la lernejo troviĝis ankaŭ mozambikaj kaj ganaj lernantoj, kiuj akompanis la foriron per tre belaj dancoj. Denove la vizitantoj demandis sin, kion celas ĉio ĉi? Kial tiom paradi? La vera instruado ne strebas imponi.

Similaj antaŭpreparo ne eblis, kiam laŭ speciala peto la buso alvenis al nordkorea lernejo. Kelkaj knaboj balais la korton; unu el ili portis T-ĉemizan

interpreti. Ĉu li plu okupiĝos pri ĝi? “Jes, mi esperas fondi la unuan klubon en Zimbabvo post mia reveno. Mi pensas, ke Esperanto proponas ion tre gravan al niaj evoluantaj landoj – ŝancon de egaleco.” La ekskursintoj aŭdis poste, ke li sukcesis kun noto “tre bona” ĉe la kurso por instruistoj en Hanabani, la semajnon post la UK.

La ekskurso finiĝis en kristala markvo, kie estraranoj naĝis kun tropikaj fiŝoj. La Insulo ne vidigas surface ĉiujn siajn trezorojn. Estus cetere iluzio, pensi ke inter ili troviĝas la sola kaj sufiĉa ŝlosilo al Esperanto en la Tria Mondo. Sed homoj kiel Olivero, eĉ se maloftaj, indigos la penan fosadon tie. Vjetnamoj siatempe spronis la vigliĝon de la kuba movado. Estos bele, se ekde nun Kubo kontribuos al la vekigo de Afriko.

Ŝanĝoj sen skuoj

Osmo Buller, la ĝenerala sekretario de UEA, ekde la 1-a de januaro denove okupos la postenon de direktoro de la Centra Oficejo. Buller jam gvidis la oficejon antaŭ la lasta direktoro, Neil Salvesen, kiu forpasis en marto. El inter pluraj kandidatoj por la posteno, la Estraro elektis lin pro liaj sperto kaj pruvitaj kapabloj.

Pro tiu elekto Buller kompreneble devos demeti sian rolon de ĝenerala sekretario (li demisios ankaŭ de la Komitato). Kiel lian sekvanton la Komitato elektis Ian Jackson, juna brita juristo kaj iama prezidanto de TEJO (1983-86), nun komitatano C. Same kiel Buller, Jackson ekoficos la 1-an de januaro 1991.

Tiuj du decidoj estas sendube la plej gravaj el Havano. La CO-direktoro (salajrata) kaj ĝenerala sekretario (libervola) respondecas inter si pri la plimulto de la ĉiutagaj laboroj de la Asocio. Pro tio la Estraro kaj Komitato zorge diskutis la alternativojn. Se ĉe Buller lia jama sperto estis decida faktoro, avantaĝo ĉe Jackson estos lia proksimeco al la prezidanto (ambaŭ loĝas en Londono) kaj al Roterdamo, ebliganta oftajn kontaktojn kaj rapidan konsultiĝon. Cetere, en la Estraro kaj Komitato ne troviĝis alia kandidato por tiu laborplena tasko.

La gvidorganoj de UEA ŝanĝiĝis en tria maniero: aliĝis du novaj landaj asocioj el Sovetunio, Ukrainia Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Asocio de Estonio. Nun entute kvin asocioj el Sovetunio aliĝis al UEA kaj leviĝas la demando, kiun rolon havos aŭ transprenos Sovetrespublikara Esperantista Unio, kies bazo troviĝas precipe en Rusio kaj Kaŭkazio. La kvin asocioj tamen amike rilatas inter si kaj sendube trovos prudentan solvon por kunlaboro.

Signifa paŝo estis ankaŭ la akcepto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kiel aliĝinta faka asocio, nur la sesa kun tia rilato al UEA. ILEI tiel restarigis la situacion de antaŭ 1974, ĉar siatempe ĝi estis inter la kelkaj organizaĵoj kiuj sekvis prof. Lapenna el la Asocio. Per aparta interkonsento, UEA komisiis al ILEI la plenumon de sia internacia eduka laboro: "t.e. ĉiaj agadoj por altigi la lingvan kaj kulturan nivelon de la Esperanto-parolantoj (i.a. ekzamenoj), por disvastigi la instruadon de la internacia lingvo ĉiunivele kaj por


rilati kun edukaj instancoj tiucele . . . Farinte tion, UEA establis kun ILEI aparte intiman kaj proksiman ligon, kion spegulas la kunlaboraj rilatoj inter la du organizaĵoj." Ankaŭ en Havano, du fakaj asocioj ricevis kunlaborajn rilatojn kun UEA sen aliĝo: Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo (ATEO) kaj Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj (LSG).

-
- *Buller redirektoros*
 - *Jackson fariĝos ĝenerala sekretario*
 - *Ukrainoj kaj estonoj sendepende en UEA*
 - *ILEI aliĝas denove*
-

landaj asocioj, kaj la Komitato akceptis tiusenkan rezolucion-alvokon. Pola Esperanto-Asocio invitis la eŭropajn Landajn Asociojn al konferenco en Bidgoŝto en septembro. Kadre de la diskuto oni tuŝis ankaŭ la financajn problemojn de la orienteŭropaj asocioj, kiuj certe kaŭzos malkreskon de la UEA-membraro dum kelkaj jaroj.

La traktado de la 40-punkta tagordo okazis sufiĉe efike kaj aferece, kun kelkaj proceduraj plibonigoj. Laŭ propono de komitatano Texier, la 1-a Ĝenerala Kunsido – la komuna kunsido de la Komitato kaj la publiko – limigis sian diskuton pri la Estrara Raporto al tiuj ĉapitroj, kiuj aparte interesis la ĉe-estantojn: informado, landa kaj regiona agado, eksteraj rilatoj, kongresoj kaj turismo. La manko de kvorumo por tiu kunsido cetere estis escepta (eble ĝi ŝuldiĝis al miskompreno flanke de la novaj komitatanoj). En la aliaj kunsidoj, krom la unua, oni facile superis la limon de 48 voĉdonrajtaj komitatanoj.

La Estraro, al kiu mankis nur malsaniĝinta G. Maertens, venis al almenaŭ unu plia raportinda decido. Ĝi akceptis la inviton de Ĉeĥa



Unuafoje en la 82-jara historio de UEA, reprezentantoj de aliĝinta sovetia asocio partoprenis la kunsidojn.

La ĉefaj principaj diskutoj en la Komitato koncernis la ŝanĝiĝantan situacion en orienta Eŭropo. Multe kreskis la ebloj por instruado de fremdaj lingvoj tie, sed ofte Esperanto ne povas proponi sufiĉe fortan lernmotivon por gajni en la konkurado. Ĉiuj vidas la bezonon de pli bona kunlaboro inter la

Esperanto-Asocio al Universala Kongreso en Prago en 1992, tamen postulante, ke ĈEA plenumu la kondiĉojn de la Kongresa Regularo antaŭ la fino de oktobro 1990. Tiuj koncernas la certigon de kunlaboro kun ŝtataj, turismaj kaj esperantistaj instancoj.

Kongresaj stilekzercoj

Mil ses cent kongresanoj, mil ses cent malsamaj kongresoj. Se en ĉi tiu numero ni provas distili kelkajn komunajn impresojn, tamen restas vero, ke ĉiu unuopulo priskribus siajn spertojn alimaniere. Ĉi tiujn du paĝojn ni do malfermis al manpleno da "siaspecaj" resumoj.

Seke

Okazis inaŭguro. Okazis la kongresa temo. Okazis Tago de la Libro. Okazis Tago de la Lernejo. Okazis Tago de la Paco. Okazis ekskursoj. Okazis UEA-kunsidoj. Okazis fak-kunsidoj. Okazis konversacia kurso. Okazis bankedo. Ne okazis balo. Okazis IKU. Okazis prelegoj pri Kubo. Okazis Esperantologia Konferenco. Okazis koncerto. Okazis teatraĵoj. Okazis Nacia Vespero. Okazis Internacia Vespero. Okazis fermo. Granda sukceso. Krom la balo.

"Dolaroj!" mi diris, "kial vi ne akceptas vian propran monon?", sed kiel ajn, estas nenio por aĉeti, do plej bone resti ĉi tie kaj provi trovi iun kubanon kiu kapablas paroli Esperanton, Dio scias, ke ne estas multaj, cetere ĉiujare estas same, ni vojaĝas milojn da kilometroj kaj babilas kun samlandanoj . . .

Propagande

"Ekde nun mi dediĉos min al la disvastigo de Esperanto," deklaris Fidel Castro hieraŭ vespere al nia urbano Johano Forĝisto, kun kiu li longe kaj varme interparolis. La kuba ŝtatestro donis akcepton por ĉiuj kvin mil partoprenantoj en la 75-a Universala Kongreso de Esperanto, kaj anoncis la oficialan enkondukon de Esperanto en la nacian eduksistemon. Jam de pluraj jaroj la oficialaj kontaktoj inter Kubo kaj Sovetunio okazas pere de la



Sovetiane: "Tri paroladoj de Gorbaĉev

Ebrie

Je la sano de Fidel! Kelnero, du pliajn mohitojn . . . Ne estas mohitoj? Sed mi ĵus trinkis . . . Nu, egale, du Tom Kolinz. Aŭ ĉu mi celas Ron Kolinz? Diable, nun mi forgesas, sed iu el tiu familio, ĉiukaze . . . La ŝefa afero estaŝ la rumo. Ne forgesu la rumon! Dankon. Kio estaŝ tio? Haha, Cuba Libre . . . tio memorigas min pri serĉo, mi volas diri pri ŝerco. Kiu 'staŝ la plej malbona kelnero en Kubo? Vi jam aŭdis? Domaĝe! Je lia sano, ŝiukaze! . . . Kioma horo ŝtaŝ? Ah, nun mi maldrafiŝ la dea . . . trea . . . teadraĵon. Ne gravaŝ, ŝtaŝ pli amuze ŝi tje. Kelnero! du Cuba Libre! . . . Ne plu Cuba Libre? Do, mi prenas dajkiron, kiel Hemingway, ĉu vi aŭdaŝ . . .

Realisme

El demografia enketo ĉe kunsido pri la kongresa temo:

63 ĉeestas, el kiuj:

12 endormiĝis;

8 ne komprenas la enketajn demandojn;

5 atendas la pupteatron;

15 ankoraŭ provas ekscii el sia Kongresa Libro, pri kiu kunsido temas;


1 venis por anonci la fakkunsidon por karotbredistoj;

1 esperas paroli pri la danĝero al la tropikaj pluvarbaroj;

1 venis por reagi al ĉiuj paroloj pri tropikaj pluvarbaroj;

12 partoprenis la kunsidojn pri la kongresa temo en la lastaj dudek kongresoj;

8 ĉeestas sian unuan kongreson kaj estas ravitaj pro ĉio.




Infane: "Mi trovis la IKU-prelegojn plej amuzaj, kaj vi?"

Grumble

. . . kaj ni trovis tri blatojn en la banĉambro, kaj, ĉu vi povas kredi, neniun parolis Esperanton kaj la Cubatur-homo malaperis, eĉ en la kongresejo neniun volis helpi min, kaj ĉiukaze kion ajn ili diras, ĝi okazos unu horon pli malfrue, sed ne gravas al mi, ĉar estas nenio interesa en la programo, laŭ mi des pli bone, ĉar oni havos gripon pro la terura malvarmo en la salonoj, sed jen, ili malliberigis nin ĉi tie kaj oni devas pagi la taksion en dolaroj –

Internacia Lingvo. Dek mil afrikaj instruistoj jam trejniĝis pri la lingvo sur la Insulo de la Junularo, kaj reiris por liberigi sian kontinenton de la malbeno de Babelo. Oficialaj delegacioj el pli ol cent landoj diskutas ĉe la kongreso pri tutmondaj satelitaj elsendoj en Esperanto, kiu cetere estas jam oficiale akceptita de Unesko kaj Unuiĝintaj Nacioj. S-ro Forĝisto cetere gvidos kurson ekde la 1-a de septembro en sia kelo . . .



senpage kun ĉiu muzik-disko.”

vian helpojn por klarigi ion al la kubaj helpantoj. Ili estas ofte senpaciencaj. Estas granda atingo, kiam vi sukcesas ekkoni la nomon kaj landon. Malofte ili restas por plue interkonatiĝi, kaj vi facile rezignas la klopodon.

Ekŝajnas, ke multaj gravuloj de la Esperanto-movado eĉ ne venis. Vi miras pri tio. Vi iras al kelkaj prelegoj, sed ili estas tro malfacilaj.

La semajno pasas. Subite estas vendrede, kaj vi apenaŭ konatiĝis kun eksterlandanoj. Vi seniluziiĝas. La ĉiufankaj konversacioj nun ŝajnas fermitaj, fremdaj.

Ĉe la fermo vi sidas kun aliaj kubanoj kaj babilas hispane. Vi hontas, samtempe sciante, ke fari alie ne indas la penon.

Lokokoe

Kaj iu perdis la fluglistojn, do ni devos deĵori en la flughaveno ĝis nokto-

mezo . . . Ĉu vere estas nur unu tajpilo ĉi tie? Ne demandu min pri Cubatur, mi jam parolis dudekfoje kun ili. Vidbendo? Verŝajne ni povos aĉeti en apuda strato. Jes, per tiu buso vi atingos la marbordon. Ŝajnas ke la papero elĉerpiĝis, bedaŭrinde. Ne ekscitiĝu, mi petas . . . Mi ne scias, kial oni ĉesis vendi mohitojn. Ĉu iu vidis ie la pianistinon, kiel ŝi nomiĝas? Pri la telefonprezoj ĉi tie ni havas neniun influon. Salono Ariste? Mi vidis la nomŝildon ie ĉi tie . . . Jes, estis iu eksterlanda ĵurnalisto, sed mi ne havis tempon paroli kun li. Dankon, mi jam tute bone aŭdis, sed nenio plu fareblas. Kie diable estas nia prezidanto? Ĉu vi diris, ke Fidel invitis? Neimageble! Ne, mi ne scias kiu pruntis la tondilon. La flago simple devos resti ĝis la venonta semajno. Kiel mi sciu, kiu loĝas en Capri, tio ne estas mia fako. Ĉiukaze ne necesas krei . . .

Adverbe

(Ĉi tiu ero estas dediĉita dankeme al tiuj, kiuj:) tetrinkis oomote, ĉambroserĉis ariste, intervjuis raole, teatrumis markse, akceptis fidele, masaĝis diine, kurieris trioje, maratonis prezidante, belartis kamaĉe, filatelis vane, libro-servis paskale, malvarmumis lapene (kaj ankaŭ ĉee kaj private), sendependis ukraine, pactagis neŭtrale, kaŝiĝis kastele, komitatis tondroŝtorme, amindumis vid-al-Vide . . .

Kubane

Vi lernas dum unu jaro Esperanton, ĉar ĝi ŝajnas interesa kaj la tempo ne mankas.

Vi ekaŭdas pri UEA, pri bibliotekoj kun miloj da libroj, pri universitatoj kaj kulturcentroj kaj fakaj asocioj, kaj vi miras kaj scivolas.

Vi aliĝas al la kongreso, la fenestro al tiu mondo. Sed ĉu vere oni komprenos vin? Ĉu oni volos paroli kun unu kubano inter tri cent? Iel mankas la fido.

Vi devas mendi loĝadon kaj transporton. Kompreneble, tio okazos aparte de la eksterlandaj gastoj, ĉar tiel ĉiam estas.

En la kongresejo, amaso da homoj. Ĉie oni parolas Esperanton, tamen vi ne ĉiam bone komprenas. Vi ricevas la kongresan libron nur post du tagoj. Ĝi estas tre komplika.

Vi ĉeestas la malfermon. Ĝi estas impona kaj vi komprenas la duonon. Poste kun kubaj amikoj vi provas eltrovi, kiuj estos la gravaj programeroj. Neniu scias.

Fojfoje iuj eksterlandanoj deziras

Joakime:

“Nu, kaj kiom da filmistoj vi konas, kiuj turneas tra tuta Azio?”



Taŭga festo por 50 000 krokodiloj

“La juna movado estas karikaturo de la plenaĝa, kaj trafan karikaturon de ambaŭ prezentas bildo de brontosauŭro, kun grandega korpo, longaj vosto kaj kolo, kaj tre malgrandaj kapo kaj cerbo.” Tiel Georgo Kamaĉo lanĉis sian polemikon kontraŭ la “funkcia nelegipovo” kaj “movadhistoria analfabeteco” de la TEJO-anaro, en eseo kiu gajnis honoran mencion en la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj. Por daŭrigi similstilo: La 46-a Internacia Junulara Kongreso estis karikaturo de la Universala, eĉ karikaturo pri si mem. La brontosauŭro elefantiazis . . .

Jes, ĉi-foje ne temos pri ĝentile ekvilibra prezento fabrikita el ŝablonaj laŭdoj. La 46-a IJK efektive havis neniun sencon. Certe ne por la kubanoj: la spertaj kaj agemaj iris al la UK, kaj por la posta aranĝo restis al ili nek tempo nek mono. Tiuj, kiuj efektive venis, trovis nenion krom kuba plaĝo kaj iom da babilantaj gejunuloj. Mi ne scias, ĉu ili domaĝis la elspezon, sed mi dubas, ĉu la sperto inspiris ilin.

Se la kongreso ne profitigis la lokan movadon, des malpli ĝi helpis al TEJO. Maksimume tiu ĉi gajnis ekstereŭropan adreson sur sia listo de kongresoj. Ĝiaj komitatkunsidoj kompreneble estis nekvorumaj, kaj la plej memorinda decido, kiun oni povis raporti al mi, estis la alpreno de “La bamba” kiel oficiala himno de TEJO. Pri aliaj kongresaj agadoj – kunsidoj, seminarioj kaj simile – estis neniuj spuroj, eĉ ne pri la junulara movado en Latinameriko . . . ĉar mankis ne nur kubanoj, sed ankaŭ meksikianoj, brazilanoj ktp. Tiom por la aspiroj de TEJO pri “tutmondiĝo”.

Gajnis nek Kubo, nek TEJO – kaj ankaŭ ne la movado en pli larĝa senco. Kutime la IJK funkcias kiel renkontiĝejo por la vivanta Esperanto-kulturo: venas muzikistoj, libroŝatantoj, organizantoj, vojaĝemuloj, kaj kreas siajn proprajn rondojn ekster la programo. Ĉi-foje nur eta malplimulto povis ĉeesti (aliĝis ĉ. 150, venis eble cento); do la movado malhavis unu el siaj plej universalaj forumoj, ĝuste en jaro, kiam tio povus esti ege grava. Cetere, pro la aranĝo de la kongresejo eĉ la ĉeestantoj malfacile trovis unu la alian. La kutima etoso de komuneco preskaŭ tute mankis.

Kio do okazis? Estis kvar prelegoj, de mi mem, Ulrich Lins, Bernhard

Westerhoff kaj Orlando Raola, pli malpli sub la temo “Alfabetigo”; ĉeestis trideko da homoj. Estis absurdaj malfermaj kaj fermaj ceremonioj, kiam ni devis aŭskulti stultaĵojn de la loka partia vicsekretario (aŭ simile), aŭ gluti parodiecan raporton pri la “kongresaj laboroj” (ja temas pri karikaturo). Estis amaso da ekskursoj (fiŝejo, kuracejo, krokodilejo – 50 mil da ili!, naĝejo, turismejo, pitoreskejo ktp). Estis kelkaj amuzaj kaj kelkaj tedaj vesperoj. Por la plimulto de la partoprenantoj, estis plaĝo. Punkto.

Por kelkaj, tio ja preskaŭ sufiĉis. Estis agrabla feriado, kun ŝanco ekvidi novajn vizaĝojn. Sed kiam mi pensas, ke oni kolektis gejunulojn el tri aŭ kvar kontinentoj por sidi sur la sablo kaj sencele babili . . . venas en la kapon la malnova demando de Ĝanfranko, “Ĉu ĝi estas movado aŭ senmovado?” Per tiaj renkontiĝoj ni nek tiresas nek raŭmas: nek kreas ion propre valoran, nek ŝanĝas la mondon.

Kvinpinta Semajno:

Kaj plu simile

Roterdamo, 14 aŭgusto 1990
Kara amiko,

Mi esperas, ke via restado en Kubo estis ĝuodona. Mi ne demandas vin nun pri la evento, certe mi povos legi en diversaj E-gazetoj. Eĉ tro.

Ankaŭ mi partoprenis E-renkontiĝon – la “veran IJK”, kiel mi aŭdis ĝin nomi. De naŭ jaroj esperantisto, de kvar eĉ profesia . . . post tio oni ne plu atendas multajn surprizojn. Tial mi ankoraŭ cerbumas: kio damne estas la ŝlosilo de tiu absoluta trafo en la renkontiĝa mondo?

Sentonte min juna esperantisto travojaĝanta Eŭropon, manĝonte en parkoj kaj dormonte en trajn- kaj ŝipkoridoroj, mi kun la konata peno enpakis miajn aĵojn kaj direktis miajn paŝojn, ne tre ĝoje, al unu el tiuj rutine tradiciaj, banaliĝantaj Esperanto-renkontiĝoj. Vi ja konas ilin . . . La unua tia renkontiĝo estas unika sperto en la vivo (ankaŭ por mi, siatempe). La dua estas bonega, la tria bona, la kvara

Post tiu litanio de malkontento, mi senkulpigu la kubanojn. Ili ege klopodis, kaj sukcesis, certigi bonajn turismajn kondiĉojn por la kongreso. Ne ili kulpas, ke neniuj LKK-ano partoprenis en eŭropa IJK. Ne ili respondecas pri la senzorga decido kongresi en Kubo, nek pri la plena manko de gvido aŭ helpo flanke de la TEJO-organoj. Ili kribris ĉiujn raportojn el la revuo *Esperanto* dum la lastaj dek jaroj . . . raportojn, pri kies nivelo mi mem havas kialojn honti. Ili pene ellaboris programon, kiun oni (kiel kutime) amase malpartoprenis. Ili ne estis kulpuloj, sed viktimoj . . .

Pli ol kelkaj respondecaj individuoj, kulpas la tuta junulara kulturo, al kiu aludis Georgo . . . kaj preter ĝi, la plenkreskula. Kongresoj estas unika okazo por trejnado; por strategiaj diskutoj; por klerigado kaj informado. Tamen tiaj aferoj ne aranĝas sin mem. La kongresanoj devas veni kun tiaj atendoj, kaj la atendojn devas flegi la organizantoj. Se oni lasas ĉion ĝis la lasta momento, rezultas tio, kion ni havas nun: malplenaj paroloj sen agado, sentoj de frustriĝo kaj seniluziĝo, forkuro al la distraĵoj kaj turismaj flankoj. Oni vidas tion abunde okazi ĉe la

sufiĉe amuza, la kvinan oni trairas, la sesa . . . nu, ĉe la sesa oni renkontas la samajn homojn, parolas pri la samaj temoj, okazas preskaŭ precize la samaj aferoj . . . Sento de enuado ekinvas, kaj oni naŭziĝas de la tuta afero. Foje mi sentas, ke la movado bezonas revolucion.

Nu, almenaŭ el renkontiĝa vidpunkto tiu ĉi estis plene escepta. Ha, diable, mi forgesis entute sciigi vin, pri kio temas. Loko: Finnlando, ia urbeto kun la por mi ekzotika nomo Naantali. De la 23-a ĝis la 29-a de julio, samtempe kun via kuba IJK. Kaj l’ aranĝo nomis sin 1-a Kvinpinta Semajno, mallonge KPS. (Kial “Kvinpinta”? La kvin landoj de Nordio. “1-a” kaj “Semajno” vi povas mem eldetektivi, ja esperantistoj estas ekstreme inteligentaj.)

Aliĝintoj 170, partoprenintoj ĉ. 150, mi pensas (mi ne havis paciencon nombri ilin). La kongresejo dormejis, manĝejis kaj kunvenejis, multe pli taŭge ol ĉe UK. Sufiĉe multaj el niaj konatoj ĉeestis tie (jes, ankaŭ Eckhard Bick, kun sia ludo Geo. Kaj kun Killian, lia infano, kiu sukcesis lacigi min ĝis surplanken-falo). Sed ankaŭ novaj



Finfine iom da IJK-eco: postprelega rondo kun Orlando Raola estigis spontanen diskuton pri Kubo kaj la kongresoj.

Universalaj Kongresoj, dum la junulara karikaturo eĉ faras kulton el la spontaneco. TEJO sisteme malzorgas la IJK-ojn jam de jaroj. Tuta vico da kongresaj komitatoj faris sian laboron en izolo, malebligante ian daŭran tradicion krom tiu de . . . sentradicieco. Tiun krudan realon kutime maskas la partopreno de la samaj homoj, jaron

post jaro. Sed en Kubo la masko forfalis.

La supraj linioj estas skribitaj polemike, kompreneble. Mi povusegale facile elpluki kelkajn pozitivajn kaj prezenti pli allogan bildon . . . pri nia konatiĝo kun la kuba vivo, pri ridiga teamludo en unu el la vesperoj, pri vigla diskuto kun Orlando Raola pri la apartaĵoj de lia lando. Aŭ simple laŭdi

la homajn kontaktojn, kiuj naskis amikecon kaj amon. Ni ja facile kontentiĝas per tiaj pensoj. Sed se nur tial ni kongresas, kial entute TEJO ekzistu? La Kvinpinta Semajno – kaj jam kelkfoje la hungaraj Junularaj Semajnoj – montris, ke oni povas eĉ pli bone renkontiĝumi sen ĝi. Sen io speciala, io ligita al la ideo kaj praktiko de *tutmonda, esperantista organizo*, la IJK malhavas apartan karakteron, apartan signifon.

Por ne nur negativi, eble mi donu kelkajn konkretajn proponojn. Kongresa komisiono el homoj, kiuj organizis la lastajn IJK-ojn, povas konsili al la novaj organizantoj, zorgante pri kontinueco kaj internaciaj kontaktoj. En la listo de nepraj kongresaj aranĝoj estu (a) regionaj kunsidoj, (b) trejnsesioj (eble laŭ modelo de la PSEK-seminarioj, eble alistile), (c) prelegoj pri nia historio kaj kulturo, pri kies efektivigo respondecu la TEJO-estrarano pri kongresoj. Se oni volus fari tion, tio eblus ankaŭ en Kubo; ĝi certe eblos en Svedio. Kaj eble venontjare ne necesos rekunkudri la samajn ĉiftajn komplimentojn por kaŝi la senmovadan realon.

Mark Fettes

(denove TEJO-ano ĝis 1992)



vizaĝoj. Nenia inundo tamen da eksorient-eŭropanoj! Ankaŭ da eksokcidentaj ne, simple bele dividiĝis l' afer'.

Kompreneble vi volas scii, kiuj estas la kaŭzoj de tiel sukcesa renkontiĝo. Mi ne povas diri. Mi ankoraŭ cerbumas. Amaso da prelegoj kaj aktivaĵoj *samhore* helpis, ke oni preskaŭ ĉiam trovis ion laŭ sia gusto. Ankaŭ la strukturigo de la programo estis inteligenta. Post ege bonvena duonhora paŭzo inter du blokoj da prelegoj, ripozinte aŭ ludinte aŭ farinte kion ajn, iri al sekva aktivaĵo estis nenia problemo.

Viglo kaj vario

Kaj la prelegoj mem estis variaj. Ege variaj. Du lingvaj kursoj, pri la finna kaj la kataluna (kiujn ambaŭ mi ĉeestis, kun aparta plezuro la duan, ĉar ne ĉiuj hispanoj subpremas katalunojn). Originalaj romanoj en Esperanto, fabeloj de Andersen, kukbakado, saŭnokulturo, raporto pri Kubo, Sudio pri Nordio/Nordio pri Sudio, sinprezentado de ĉiuj kvin nordiaj landoj (ne pensu, ke mi ĉeestis ĉion, mi simple

prenis mian kongresan libreton, ege ĉarman cetere, kaj kopiis por vi el ĝia enhavo). Pluraj koncertoj (Amplifiki kaj Persone, inter aliaj), Freneza Tago (mi ne bezonis partopreni, da tio mi havas mem sufiĉe), Interkona Vespero, Internacia Tago, "Nokta Magio" (ia ludo tra arbaro), ekskurso vigligis en pli-malpli tradicia, tamen agrabla maniero. Amaso da saŭnado, tiel vira, kiel ina, kiel gea. Kaj, nu, estis la unua fojo, kiam preskaŭ ĉiuj partoprenantoj preskaŭ nudiĝis ĉe la interkona ludo.

Kelkaj etaj atentindaj aferoj ie-tie iam-tiam spicis, kiel ekzemple kiam ni tranoktis sur la scenejo aŭ ŝtelis manĝon el la kuirejo. Ĉiu partoprenanto sendube havas siajn rakontojn – kiuj (ĉu vi konstatis?) poste fariĝas la plej memorindaj aferoj. Kiel fina ilustrado de la abismo, kiu disigas la junularajn Erenkontiĝojn disde la nejunularaj: En la KPS okazis ekstreme amuza, ŝerca striptizo (la nomojn de la du viraj partoprenantoj, konataj aktivuloj, mi prisilentos pro deco). Io tia estas absolute neimagebla en UK aŭ simila altmoŝtaĵo.

Ne pensu, amiko mia, ke ĉio estis

perfekta. Manĝo bona, tamen malabunda. La Internacia Tago, ekvivalento de Internacia Vespero, ne aparte brilis. La kreitaj esperoj pri la "Nokta magio" ne vere realiĝis. Kaj, plej grave, ne estis io nova, eksterordinara, animskua, io, kio igas onin voli plu resti en la movado. Sed nu, pri tio kulpas ne la KPS: de post 1887 ne plu okazis io tia. Ni efektive bezonas revolucion.

Tamen, konsiderinte ĉion, la bonajn kaj malbonajn flankojn, la tradiciajn kaj la iom malpli, mi povas aserti, ke la KPS estis la plej bona Esperanto-aranĝo en mia naŭjara esperantisteco. Tial, iomete pli konvinkite ol kiam mi pakis miajn aĵojn, mi kune kun Kim emas diri: "Pli!" Kion mi celas? Ho, simple demandu partopreninton de la KPS. Ne miru, se oni ridetos . . . Kaj, cetere, kiel sugestis Georgo Kamaĉo, ekde nun la mallongigo "ktp" devus fariĝi "kps": Kaj plu simile . . .

Kore via,
Francisco Javier Moleón (Nederlando)

La aŭtoro jam de sep monatoj ne plu redaktas KONTAKTO-n, kies duan numeron ankaŭ li aŭde atendas.

La “rekta” metodo: Oni maltrafis belan ŝancon, donante al la kongresa kurs-salono Cseh la nacilingvan literumon de ĝia nomo. Kiel iu atentigis, la transskribo “Ĉe” portus multe pli grandan efikon, almenaŭ ĉe la kubanoj. Aliflanke, la metodo de *ilia* “Ĉe” (Guevara) vere ne tre similas tiun de Andreo...

Pli ol simbola maratono: Unu el la unikaj vidaĵoj de la havana kongreso estis la konkurado de John Wells, prezidanto de UEA, kaj Alberto Juantorena, iama olimpika ĉampiono je 800m, en la “simbola maratono” fine de la semajno. Multaj kongresanoj donacis monsumon kun promeso duobligi ĝin, se Wells sukcesos rompi la barilon de 20 minutoj por tri kilometroj – kion li sukcesis je pli ol du minutoj! Liaj klopodoj alportis ĉ. 700 guldenojn al la Triamonda Kongresa Fondaĵo.

Nia Batista: LKK-prezidanto Castillo foje distris siajn kunekskursantojn al la Junulara Insulo per rakontoj pri la antaŭrevolucia reĝimo. Subite ekplodis rido je la informo, ke la diktatoro Batista ordonis vekti la malliberulojn je la kvara matene – ĉar ĝuste je tiu horo ekiris la ekskurso. De tiam Castillo ricevis la kromnomon “nia Batista” inter la ekskursanoj.

Ĝuoj de eksprezidenteco: Humphrey Tonkin ĉi-jare apartenis al tiuj, kiuj pleje ĝuis la kongreson. La antaŭa prezidanto, seninterrompe estrarano de 1974 ĝis 1989, en Havano unuafoje ĝuis la liberon de “simpla kongresano”, kiu mem elektas al kiuj kongresaj aranĝoj iri kaj ne iri. Imagu, ke li elektis ĉi-foje ne veni eĉ al la Inaŭguro (kvankam al tio kontribuis ankaŭ la flughoraro inter Montrealo kaj Havano). Antaŭe kongresanoj persekutis lin por subskribi iliajn bildkartojn, dum en Havano Tonkin mem trovis tempon bildkarti kaj persekuti aliajn por subskriboj.

Jarcento da malsato: “Ĉu ni povus nun kunsidi dum horo?”, demandis estrarano oficistoj de UEA vespere, fine de la kongresa semajno. “Ne, ĉar mi laste manĝis en 1830”, estis la abrupta respondo. “Tio sonas kiel nova romano de García Márquez titolita *Cent sesdek jaroj da malsato*,” komentis alia ĉeestanto. Baldaŭ klariĝis, ke temas nur pri 20-hora fasto, ĉar la interparolintoj kune manĝis la antaŭan vesperon en la restoracio “1830”, cetere unu el la plej bonaj en la urbo.

Cwik-a sukceso: Michael Cwik, oficisto de Eŭropa Komunumo kaj iom verva esperantisto kaj filmanto, regule aliĝas lastmomente al niaj kongresoj. En

Havano li lastminute aliĝis ankaŭ al la akcepto ĉe Fidel Castro. Ĉiuj gastoj tie devis lasi en la garderobo mansakojn, fotilojn ktp, kaj ankaŭ Cwik adiaŭis tie sian vidbendan kameraon. Tamen, kiam ĉe la pordo de la akcepta salonego venis la vico de Cwik manpremi kun la kuba ŝtatestro, li eluzis la momenton por peti permeson repreni la kameraon. Fidel konsentis kaj Cwik estis la sola movada filmanto en tiu unika okazo.

Herooj de Cienfuegos: La klientoj de la impona Kongresa Libroservo en Havano ne konsciis, kiajn problemojn devis venki la organizantoj por ke la libroj ĝustatempe atingu la kongresejon. Sendi ŝipe du mil kilogramojn da libroj el Roterdamo al Havano kostis 480 dolarojn, sed venigi ilin de Cienfuegos (200km sude de la ĉefurbo), kien ili erare iris pro neglekto de la kuba ŝip-agentejo, kostis 350 dolarojn. Ĉar dum semajno ne eblis lupreni kamionon, fine troviĝis granda turisma buso por fari tiun transporton. Pasquale Zapelli (CO de UEA) kaj Julian Hernández (LKK) plenumis tiun mision dum la lasta antaŭkongresa nokto, por de siaj kolegoj ricevi admirtitolon “Herooj de Cienfuegos”.

“Mi estas Fidela”: Tiel tekstis slogano, kiun sur blua rubando portis surfrunte respektinda komitatanino dum la TEJO-kongreso en Playa Girón. Amuze, kiam edzino tiel paradas per sia fideleco! Kelkaj aliaj sloganoj, tie disponigitaj de la organizantoj, estis eta atenco al la neŭtraleco. Bonŝance, pluraj kongresanoj iom modifis ilin. Al “Viva Cuba Libre” (Vivu libera Kubo) la prezidanto de TEJO aldonis “y Mojito”, por tiel glori la du plej popularajn kubajn koktelojn. Eĉ pli neŭtrale agis vizitanto al IJK, kiu sian sloganon “Socialismo aŭ morto” ŝanĝis en “Socialismo aŭ inverse”.

Unuhora balo: Kiam la muzikistoj, kiuj devis dancigi la kongresanaron ĝis la noktomezo, aŭdis ke “ne estas certigita transporto” hejmen post la fino de la aranĝo, ili decidis foriri jam je la naŭa. Tiel la Balo daŭris nur unu horon, kiu konsumiĝis per la klopodoj agordi la instrumentojn kaj ekmuziki. Suspektinda tamen restas la fakto, ke tiun vesperon la aŭtobusoj por transporto al la hoteloj jam estis tie, nekutime frue kaj akurate.



La dolĉa vivo: Kelkaj anoj de la havana LKK venis al Playa Girón, kie almenaŭ *ili* ne plendis pro la manko de ekscito!

E-afiŝojn interŝanĝi ni volas, en iu ajn lingvo kaj pri iu ajn temo. Reciproke ni sendos grandan, trikoloran, dulingvan (vaske-hispane) afiŝon. Esperanto-Grupo, Barrencalle Barrena 7, E-48005 Bilbao, Hispanio.

Kun maljunaj geesperantistoj el Usono, Japanio, Aŭstralio kaj okcidenteŭropaj landoj dez. kor. Yu Rongkang, Shashi No. 1 Textile Equipment Factory, Hubei, Ĉinio.

Esplorstudento 28-jara serĉas gemikojn tutmonde, interŝanĝas bk, pm. Ma Haibin, Postgraduate building, Henan University, CN-475001 Kaifeng, Henan, Ĉinio.

Tanzaniano 32-jara deziras korespondi internacie, ŝatas muzikon, ideajn interŝanĝojn. S. N. Nyinyimbe, PO Box 147, Bunda, Tanzanio.

Kun junaj familioj deziras korespondi Jalina kaj Aleksandro Novikov, ul. Lobenska, d.15 k.1 kv.307, SU-127644 Moskvo, Sovetunio. Ni havas unujaran fileton Aleĉjo, interesiĝas pri historio, lingvoj, politiko, muziko, dancado, vojaĝado... Ni atendas vian respondon!

Paroligiloj: ekzercoj por progresintoj. Provekzempleron petu, sendante du internaciajn respondkuponojn, de Eldonejo Kardo, 16 Woodlands Drive, Coatbridge ML5 1LE, Britio.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas unu guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon.

Anoncetoj

Instituto Goiano de Esperanto baldaŭ 20-jariĝos. Bonvolu sendi amase, por ekspozicio, infan-desegnaĵojn, poŝtkartojn, bildkartojn, nacilingvajn varbilojn, E-librojn kaj ĉiuspecajn esperantaĵojn. Poŝtkesto 954, BR-74-001 Goiânia (GO), Brazilo.

Instruisto de fiziko kaj matematiko serĉas kontaktojn kun Svedio, Norvegio, Nederlando, Danlando, Italio, Grekio kaj Jugoslavio. Stanisław Łukoś, PL-43-332 Bestwina 281, Pollando.

“Infanreĝo” en Nederlando. Kiu ne trovis sian rajton nacilingve, skribu leteron esperantlingve al Infanreĝo Internacia, Jan Profugus Vluchtman, Welterhof, J. F. Kennedylaan 301, NL-6419 XZ Heerlen, Nederlando.

Kun elementaj lernejoj en aliaj landoj dez. kor. la klasoj de s-ro Hornéro (Ecole primaire publique, F-63 640 Charensat; 8- ĝis 11-jaraj infanoj) kaj s-ino Brun (Ecole primaire publique, F-63 410 Charbonnières les Vieilles; 3- kaj 4-jaraj infanoj), ambaŭ el suda Francio.

Kantoj de Georgo Handzlik: *Sur Placo de Ĉiela Pac’ (Tjenanmen)* – dumkoncerta kasedo (18 SFR); 22 *Baladoj* – kantareto kun muziknotoj (4 SFR). Mendu ĉe: Eldonejo KLEKS, 43-346 Bielsko-Biała, Braterska 41, Pollando.

Estrarano de UEA So Gilsu nun akceptas telefaksojn ĉe sia hejma telefonnumero (02) 646-5413. Bonvolu ne plu uzi la malnovan telefaksnumeron.

Bruligado/mortigado de vidvinoj kaj sklavoĵoj ĉe entombigoj en la praskandinava religio estas mia disertacia temo en la fako religia historio. Tial mi petas helpon de ĉiuj legantoj de la revuo *Esperanto*. Se ankaŭ en via lando iam estis tiaj kutimoj, sciigu tion al mi. Min interesas arkeologie elfositaj tomboj, mitoj, literaturaj mencioj, sed ankaŭ fabeloj laŭ kiuj la vidvino mortas “pro funebro” ĉe la entombigo. Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., S-951 56 Luleå, Svedio.

La Gazeto

sendependa
mondkultura
esperantisma
revuo

provekzemplero kaj abono:
39, rue Joseph Hénrot
F-57070 - Metz -Francio

Populara scienco je alta nivelo:

Vetero kaj klimato de la mondo

Riĉe ilustrita prezento de Riley kaj Spolton.
132 p. 25 cm. 28,50 gld.

Infoduktoj

De Brabandere esploras la socian efikon de inform-teknologio. 142 p. 21 cm. 30,00 gld.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Triona rabato ekde 3 ekz.

Bulgara Esperantisto

monata organo de BEA

- varia kaj intereskapa enhavo, riĉe ilustrita per bonkvalitaj fotoj kaj grafikaĵoj;
- aktualaj artikoloj kaj informaĵoj pri la bulgara kaj tutmonda E-movadoj;
- legindaj publikaĵoj en la rubrikoj: “Originala verkaro”, “Esperantologio kaj interlingvistiko”, “Lingvaj demandoj”, “Juna esperantisto”, “Verdaj steletoj” (porinfana), “Leteroj de korespondamikoj”, “Deziras korespondi”, “Distra paĝo” k.a.
- legantoj en pli ol 51 landoj.

Jarabono: 32 ned. gld. aŭ egalvaloro. **Abonebla** ĉe la Libroservo de UEA, naciaj poŝtoj kaj ĉe perantoj en multaj landoj. **Petu provekzempleron** ĉe la Redakcio: Hristo Botev 97, BG-1303 Sofio.

Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and
Documentation of World Language Problems

**La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.**

Redaktas: Probal Daşgupto,
Klaus Schubert, Humphrey Tonkin

Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519,
Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Individua abono: 54,00 gld. / US\$27.00
Institucia abono: 105,00 gld. / US\$ 52.50

Abonu pere de la Libroservo de UEA.

Inter pli ol 3300 titoloj ĉe la Libroservo de UEA, ne
troveblas pli valora libro kontraŭ pli bagatela prezo!

Doña Bárbara

fama romano de famaj aŭtoro kaj tradukinto


"La traduko estas rara juvelo, de kiu ekzistas en nia literaturo
tre malmulte da ekzemploj." (Waringhien)

"La tradukinto atingis la plej altan rangon de nia traduka
prozo..." (Régulo Pérez)

"La traduko impresas mirinde klara kaj posedas la netan rigo-
ron de la kabea stilo en 'La faraono'." (Vatré)

Doña Bárbara (1929), Rómulo Gallegos (1884-1969). El la his-
pana trad. F. de Diego. Karakaso: Venezuela Esperanto-Asocio,
1975. 264p. 21cm. ISBN 84 399 2885 8. Prezo: 16,20 gld. Triona
rabato ekde 3 ekzempleroj!

TIUN ĈI AVENTURON ANKAŬ VI DEVAS TRALEGI



En tiu ĉi broŝuro Gbeglo
Koffi rakontas la aventuron
de Kuturu, kiu la unuan fojon
vojaĝas en grandan urbon.
Ridiga, bela kaj leginda,
Mi vizitis grandan urbon
estas originala verko de
togolanda esperantisto.

Ĝenerala distribuanto por revendistoj
kaj libroservoj kun triona rabato:


BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Caixa Postal 11-1105, 70.084 Brasília - DF, Brazilo

La libro mendeblas ĉe UEA: prezo 10,50 gld.

NEJ-KALENDARO

**Neniu respondecas
pri sia vizaĝo....**



**....sed oni certe
respondecas pri
siaj mienoj!**

Jen vi havas la frontpaĝon de la NEJ-
kalendaro 1991. Senpage. Sed ne senvalore.
Ankaŭ la enhavo certe ne senvaloras:
abundas kantoj, enigmoj, informoj pri la
kongreslandoj de 1991, sekretoj el la
Esperanto-movado, tre sekretaj amleteroj
el la sama movado, poemoj, gvidlinioj al
la Fina Venko, internaciaj festotagoj kaj frazoj
eĉ pli saĝaj ol la ĉi-supra. Do: ĝi havindas,
ĝi havendas!

Prezo: 1 kosto NLG 10.-; 3 kosto NLG 25.-; kaj
10 kosto NLG 60.-. Tio inkluzivas la sendokostojn!
Sendu vian mendon al: Kalendara Komisiono,
Jan van Hulten, Molenslaan 74-2, 3515 VL Utrecht,
Nederlando, kaj samtempe vian pagon al Pĉk.
1035365 aŭ al UEA-konto jhul-t.

Ĉu nia plej bela infanlibro?

Artistoj kaj verkistoj el kvindek da landoj kunkreis
spritan kaj ĉarman omaĝon al Internacia Alfabetiga
Jaro. Ĝin preparis por traduko Azia Kultura Centro de
Unesko. Nun, dank' al Libroteko Tokio, esperantistaj
infanoj estas inter la unuaj, kiuj povas ĝui ĝian riĉan
mozaikon de rakontoj, ludoj kaj bildoj.

48 paĝoj. 21 x 30 cm. Prezo: 24,00 gld. Triona rabato.

Aĉetu kaj decidu mem!

Divenu do, kion mi faras!

